



EL POPOLA ĈINIO

人民中國報

3

1972

Venke Revenis al la Patrio la Delegacio de la Ĉina Popola Respubliko al la 26-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj

En la 22-a de decembro, 1971, Kiaŭ Guanhua, estro de la delegacio de ĈPR al la 26-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo de UN kaj vicministro de eksteraj aferoj, reprezentantoj de la delegacio Fu Haŭ, Hiong Hianghuj, vicreprezentanto Vang Hajjong kaj parto de la akompanantoj de la delegacio revenis al Pekino per speciala aeroplano plenuminte siajn taskojn en la sesio de la Ĝenerala Asembleo de UN.

Ilin varme bonvenigas sur la aerodromo gvidantoj de la Partio kaj la registaro Ĝou Enlaj, Giang King, Je Gianjing, Ĝang Ĉunkiaŭ, Jaŭ Venjuan, Li Hiannian, Gi Dengkuj, Li Deŝeng, Vang Donghing, Guo Mojuo, Ĝou Gianjen, Ngapo Ngavang-ĝigme, Hua Guofeng, Gi Pengfej, Geng Biaŭ, Vu De, Ĝang Cajkian k.a. kaj pli ol kvarmil popolanoj kaj komandantoj kaj batalantoj de ĈPLA de la ĉefurbo.



Historia Fluo Nebarebla

— Pri la Delegacio de la Ĉina Popola Respubliko en la 26-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj

En la 25-a de oktobro de 1971, la 26-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj aprobis per superega plimulto de voĉoj la projektan rezolucion elmetitan de Albanio, Alĝerio kaj aliaj 21 landoj, kiu postulas restarigi ĉiujn leĝajn rajtojn de la Ĉina Popola Respubliko en UN kaj tuj elpeli la reprezentantojn de Ĉiang Kajšek-klika el ĝi kaj ĉiuj ĝiaj subordigitaj institucioj. Tio estas venko de la proletara revolucia diplomatia linio de Prezidanto Maŭ, venko de la tutmonda popolo kaj la landoj, kiuj persistas ĉe justeco.

En la 11-a de novembro, 1971, la delegacio de la Ĉina Popola Respubliko kun Kiaŭ Guanhua, vicministro de eksteraj aferoj, kiel estro kaj Huang Hua kiel vicestro, atingis Novjorkon por ĉeesti la 26-an Sesion de la Ĝenerala Asembleo de UN kaj partopreni en la laboro de UN. Tie ĝi ricevis varman bonvenigon.



La ruĝa kvinstela flago de la Ĉina Popola Respubliko flirtas en vento antaŭ la sidejo de UN apud la Orienta Rivero de Novjorko.



En la 11-a de novembro, la delegacio de la Ĉina Popola Respubliko atingis Novjorkon por ĉeesti la 26-an Sesion de la Ĝenerala Asembleo de UN. Tie ĝi ricevis varman bonvenigon. En la bildo: Estro de la delegacio Kiaŭ Guanhua faras paroladon.



En la 15-a de novembro, 1971, la delegacio de la Ĉina Popola Respubliko unuafoje ĉeestis kunvenon de la 26-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo de UN kaj ricevis tre varman bonvenigon. Ĉe la sesio estro de la delegacio Kiaŭ Guanhua faris gravan paroladon. Post lia parolado, reprezentantoj de multaj amikaj landoj refoje venis al la sidlokoj de la ĉina delegacio, intime manpremis kun la estro de la delegacio Kiaŭ Guanhua k.a. por esprimi gratulon.




En la 23-a de novembro, 1971, reprezentanto Huang Hua kaj vicreprezentanto Ĉeng Ĉu al la Sekureca Konsilantaro de UN unuafoje ĉeestis kunvenon de la Sekureca Konsilantaro.

En la bildo: Huang Hua parolas en kunveno de la Sekureca Konsilantaro.

En vespero de la 23-a de novembro, 1971, Kiaŭ Guanhua kaj Huang Hua, estro kaj vicestro de la delegacio de la Ĉina Popola Respubliko, okazigis grandiozan bankedon en la sidejo de UN por esprimi dankon al la reprezentantoj de Albanio, Alĝerio kaj aliaj 21 rezolucio-proponantaj landoj kaj aliaj amikaj landoj. La bildo montras la bankedon en irado.





En la 7-a de decembro, 1971, la Unuiĝintaj Nacioj okazigis plenan kunvenon, en kiu estis akceptita per 104 voĉoj kontraŭ 11 la rezolucio, kiu postulas tujan ĉesigon de pafado de Hindio kaj Pakistano kaj respektivan evakuon de trupoj el la teritorio de la kontraŭa flanko. Ĉinio kaj plejparto de la aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj landoj donis porajn voĉojn. En la bildo: Estro de la delegacio Kiaŭ Guanhua parolas en la kunveno por draste kondamni la militan agreson kaj politikan renverson de Hindio kontraŭ Pakistano sub la subteno kaj patrono de la sovetunia reviziisma social-imperiismo.

Vespere de la 10-a de decembro, 1971, la ĉina delegacio okazigis filman akceptan kunvenon en la halo de la biblioteko de la Unuiĝintaj Nacioj, por regali usonajn amikojn.

En la bildo: Estro de la delegacio Kiaŭ Guanhua intime interparolas kun usonaj amikoj.



Profunda Amikeco inter la Ĉina kaj Usona Popoloj

DE la unua tago, kiam la Delegacio de la Ĉina Popola Respubliko al la 26-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj surpaŝis la teron de Usono, ĝi ĉie ricevis varman kaj amikan bonvenigon de la usona popolo, kio donis neforgeseblan impreson al la membroj de la ĉina delegacio.

Ĉinio kaj Usono estas apartigitaj de oceano kaj distancas inter si je miloj kaj miloj da kilometroj, tamen la vasta oceano ne povas obstrukci la disvolviĝon de la amikeco inter la popoloj de la du landoj. Ankaŭ la krimaj agadoj de la usona registaro, kiu praktikas politikojn de malamikeco kaj blokado kontraŭ Ĉinio, ne povas detrui la amikan sentimenton de la usona popolo al la ĉina popolo.

La atingo de la ĉina delegacio komencis novan paĝon en la historio de amikeco inter la ĉina kaj usona popoloj.

“BONVENON! BONVENON!”

Post la atingo al Novjorko la membroj de la ĉina delegacio ofte aŭdis varmajn salutojn “bonvenon! bonvenon!”, ĉu en la hotelo, ĉu en la domo de UN, ĉu sur stratoj. Iutage, kiam membroj de la delegacio promenis en la Centra Parko, iu advokato kaj lia edzino aliris kaj varme premis la manojn de la ĉinoj dirante: “Ni bonvenigas vin al Novjorko! Via alveno estas la plej grava evento en 1971!” Vidinte membrojn de la ĉina delegacio, iu taksia ŝoforo tuj bremsis sian veturilon kaj mansalutante kriis laŭte: “Bonvenon! Bonvenon!” Iu usona ĵurnalisto, kiu venis al Jan-an en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, tiel ĝojis, kiam li vidis membrojn de la ĉina delegacio, kvazaŭ li vidus malnovajn amikojn. Li malflue parolis per la ĉina lingvo por esprimi sian ĝojecon. Oficistoj en la domo de UN diris, ke post alveno de la ĉina delegacio rimarkinde plimultiĝis la homoj kiuj iris viziti la domon de UN. Renkontinte membrojn de la ĉina delegacio en la koridoro, ili ĉiam tre amike alpaŝis por manpremo kaj deman-

dis pri ĉinaj aferoj kiuj interesis ilin. Kelkaj vizitantoj diris: “Se ne estus multaj aferoj de la Sesio de la Ĝenerala Asembleo de UN, mi ja dezirus inviti vin al mia hejmo por interbabilo!” Iu virino el Miami, la plej suda urbo en sudoriento de Usono, speciale sendis al la delegacio foton de sia 9-jara fileto por esprimi sian amikecon al la nova Ĉinio kaj la ĉina popolo. Pearson de Newjersey skribis en sia varma letero: “Amikoj, pro la registaro de nia lando, dum tro longa tempo la civitanoj de la Popola Respubliko (de Ĉinio) kaj Usono ne havis okazon esprimi reciproke al si amikecon... Mi scias, ke kiam mi diras ‘bonvenon’, mi povas reprezenti multajn usonanojn. Mi esperas, ke via restado ĉe ni estos plej fruktodona, kaj mi sendas al ĉiuj membroj de via delegacio la plej bonan deziron.”

ĜOJO PRO VENKO

La rezulto de la voĉdonado de la Ĝenerala Asembleo de UN en la 25-a de oktobro 1971 deklaris kompletan bankroton de la intrigo de la usona imperiismo malhelpi restarigon de la leĝaj rajtoj de Ĉinio en UN. Tio estas komuna venko de la tutmondaj popoloj inkluzive de la ĉina kaj usona popoloj. Renkontante membrojn de la ĉina delegacio ĉu en kaj ekster la domo de UN, aŭ sur stratoj, multaj ordinaraĵoj salutis ilin per la venka mansigno “V”. Tio ne nur estas amika gratulo, sed ankaŭ esprimo de ilia sincera ĝojo pro tiu venko. Iu ĵurnalisto skribis el Ĉikago: “Jam estas korektita la serioza historia maljusteco al la lando de la granda popolo. Permesu al mi esprimi admiron kaj respekton al viaj granda popolo kaj gvidantoj.” Iu junulo fiere diris al membroj de la ĉina delegacio, ke en 1957, kiam li estis lernanto de la unua klaso de mezlernejo, li rifuzis subskribi por subteni la politikon de la registaro pri malhelpo de restarigo de la leĝaj rajtoj de Ĉinio en UN. Li diris, ke nun li fine vidis ĉi tie ĉinajn amikojn kaj pro tio li sentis grandan ĝojon.

La aktivado de la ĉina delegacio en la Ĝenerala Asembleo de UN vaste altiris atenton de diverstavalaj popolanoj de Usono. Ĉiufoje, kiam la ĉina delegacio faris paroladon, en la galerio de la kunvenejo ne troviĝis vakantaj sidlokoj kaj ankoraŭ pli multaj homoj legis raportaĵojn pri la nova Ĉinio en ĵurnaloj kaj atente aŭskultis ĝian voĉon el televidaj programeroj. En sia letero al la ĉina delegacio Narus de Connecticut-ŝtato skribis: "Mi vidis vin en televido... tio estis por mi agrabla momento. Via sinteno kaj parolado profunde impresis min. Mi opiniis ke tio estas granda..." Doulden, 19-jara studento de Pennsylvania, diris: "Tre profunde min impresis la informoj pri vi legitaj de mi." Multaj usonanoj sendis al la ĉina delegacio ĵurnalajn eltondaĵojn kaj fotojn kolektitajn de ili pri ĝiaj agadoj en UN kaj petis la lastan subskribi por memoro. Ankaŭ multaj homoj petis plenajn tekstojn de la paroladoj de la ĉina delegacio.

La firma starpunkto de Ĉinio subteni la tutmondajn popolojn en ilia batalo kontraŭ hegemoniismo kaj potenco-politiko de la superpotencoj ricevis grandegan simpation kaj subtenon de la usona popolo. Iu usona nigrula knabo diris: "Mi tre ĝoje sciigis, ke jam nemalproksima estas la tago, kiam UN ne plu estos regata de la tiel nomataj superpotencoj. Mi deziras al vi grandan sukceson en via justa batalo por plibonigi la staton de la ekspluatataj popoloj de la tuta mondo."

KUNE KANTI «LA INTERNACION»

Nigraj nuboj ne povas ŝirmi la sunon. La trompa propagando de la reakcia reganta kliko de Usono ne povas tute malhelpi la usonan popolon koni la atingojn de la nova Ĉinio. Fraŭlino Geyere de Stanford diris, ke la atingoj de Ĉinio en popola bonstato kaj venko de la granda kultura revolucio profunde impresis ŝin. Iu 70-jara maljunulino intime diris al membroj de la ĉina delegacio, ke ŝi multjare vivis en la malnova Ĉinio kaj ŝi denove vizitis Ĉinion post la Liberiĝo. La grandega ŝanĝo de Ĉinio tre kortuŝis ŝin. Tial, post la reveno al Usono ŝi faris publikajn raportojn en multaj urboj de Usono al diversrondaj personoj pri siaj impresoj pri Ĉinio. Wallis de Newjersey entuziasme diris: "Mi fieras pro vi, la ĉina popolo kaj ĝiaj atingoj en la pasinta periodo." Li aldonis: "La tuta mondo observas Ĉinion, kaj ĉiuj 'malgranduloj' kun respekto kaj admiro rigardas vin."

Ĉiuj atingoj de la ĉina popolo estas neapartigeblaj de la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ. Multaj usonaj amikoj skribis leterojn al la delegacio por

peti «Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong» kaj liajn aliajn verkojn. Iutage, kiam membroj de la ĉina delegacio promenis sur strato de Novjorko, du junuloj veturantaj per bicikloj, vidinte ilin, laŭte kriis varme svingante sian manon: "Vivu Prezidanto Maŭ!"

En la filma akcepta kunveno aranĝita de la ĉina delegacio multaj usonaj amikoj kun granda intereso rigardis la ĉinan revolucion modernan baledon «Ruĝa Virina Taĉmento» kaj foje-foje manklakadis. Iu amiko diris, ke aldoni al okcidenta baleda arto tian revolucion enhavon ja estas nova kreo. Iu virino estis kortuŝita ĝis larmoj kaj ne volis foriri, kaj iuj ekkantis «La Internacion» laŭ la muziko en la filmo.

KOMUNA DEZIRO

Pli multe koni la prosperan socialisman novan Ĉinion kun sepcent-miliona popolo estas komuna deziro de preskaŭ ĉiuj usonaj amikoj, kun kiuj kontaktis la ĉina delegacio en Usono, kaj ankaŭ komuna deziro de la vastaj amasoj de la usonaj popolanoj. Usonaj amikoj diris, ke en multaj altaj kaj mezaj lernejoj de Usono estas aranĝitaj "ĉina tago", "ĉina semajno" aŭ aliaj raportaj kunvenoj pri la nova Ĉinio. Iuj studentoj diris al membroj de la ĉina delegacio, ke ili decidis preni problemon pri Ĉinio kiel temon de iliaj disertaĵoj kaj petis liveri al ili librojn kaj aliajn materialojn pri Ĉinio. La atingoj de Ĉinio en akupunkturo multe interesis la usonan popolon, precipe personojn de la medicina rondo. Iuj kuracistoj sendis leterojn al la ĉina delegacio por peti tiurilatan materialon. Du studentoj de la ĉina lingvo skribis leteron al la ĉina delegacio per la ĉina lingvo: "Ni esperas ke ni persone veturos al Ĉinio en iu tago...Pli multe koni la ĉinan kulturon sub la gvido de Prezidanto Maŭ certe tre utilas al ni." Iu amiko diris al ni, ke kiam instruisto demandis studenton pri lia plej granda deziro, la lasta tuj respondis: "Veturi al Ĉinio en iu tago!"

Ĝuste kiel la estro de la ĉina delegacio kamarado Kiaŭ Guanhua diris: "La usona popolo estas granda popolo kaj inter la ĉina kaj usona popoloj estas profunda amikeco." Se la usonaj reakciuloj ne povis detruĝi tiun amikecon en la pasinteco, do ili des pli malfacile povos malhelpi la disvolviĝon de tiu amikeco. La unuiĝo kaj amikeco starigita sur la bazo de opono kontraŭ agresiva kaj milita politikoj de imperiismo kaj batalo por mondopaco kaj socia progreso estas nedetruenda per ĉiu ajn forto.

HE ŜIJAŬ:

Tri Komun- istinoj



He Gjunking (maldekstre), Hju Jugie (meze) kaj Song Hinju parolas pri siaj komprenoj pri «La Komunista Manifesto».

EN la multaj jaroj de revolucia milito kaj en la socialisma konstruado de nia lando, la ĉinaj virinoj faris eminentajn kontribuojn. Jene ni prezentas tri komunistinojn Song Hinju, Hju Jugie kaj He Gjunking de Ĉang-an-vilaĝo de Ĵaŭjang-gubernio de Hebej-provinco. Ili estas elstaraj reprezentantoj de miloj kaj dekmiloj da virinoj de la nova Ĉinio marŝantaj sur la revolucia vojo. Ili estas kompartianoj de pli ol 30 jaroj. En tiuj jaroj ili ĉiam iras la unuaj en la revolucia laboro.

HEROINOJ EN LA KONTRAŬJAPANA REZISTMILITO

En 1939, partia filio stariĝis en Ĉang-an-vilaĝo, kaj tiam He Gjunking jam estis kompartiano de 8 jaroj. La 25-jara Song Hinju kaj 26-jara Hju Jugie aliĝis al la Partio en 1938. Depost la Evento de la 7-a de Julio de 1937, la japanaj imperiistoj grandskale invadis Ĉinion kaj la kontraŭjapana batalo flamis tra la tuta norda Ĉinio. Ankaŭ la vilaĝo Ĉang-an sur la ebenejo de centra Hebej estis envolvita de la milita flamo. Sub la gvido de partia organizo, malriĉaj kamparanoj fondis Kamparanan Ligon; gejunuloj organizis sin en la Kontraŭjapanan Nacisavan Pioniran Taĉmenton; infanoj starigis Geknaban Ligon kaj virinoj partoprenis en la Virina Kontraŭjapana Nacisava Asocio. Song Hinju estis gvidanto de la tiama virina asocio de Ĉang-an-vilaĝo. Por subteni sian propran armeon en rezisto kontraŭ la japana agreso, la virinoj konkure kudris ŝuojn kaj uniformojn por la armeo. Foje, la malgranda Ĉang-an-vilaĝo ricevis la taskon de fari de 150 paroj da ŝuoj.

Ĉiuj kudradis tagnocte. Por ke la ŝuoj estu pli konvenaj al soldatoj en irado kaj militado, ili kudris la ŝuojn kun profunda amo al sia propra armeo per bonaj fadenoj kaj densaj kudreroj. Song Hinju faris 7 parojn da ŝuoj kaj 4 uniformojn en unu monato.

Krom farado de ŝuoj kaj vestoj, la virinoj ankaŭ batalis kontraŭ malamikoj per armiloj kiel viroj. Tiam la estro de la memdefenda taĉmento de la vilaĝo estis He Gjunking. Ŝi, kun la aĝo de pli ol 20 jaroj, estis tre kapabla junulino. Portante sur si armilan zonon kaj pistolon ĉe la talio, ŝi gardostaris kune kun milicanoj. Kiel brave ŝi aspektis! Tiam en la gubernia urbo garnizonis japanaj agresantoj kaj pupaj armeanoj. Ili okupis kelkajn punktojn, faris malbonojn en tagoj kaj sin kaŝis nokte en la punktoj. Iun nokton, He Gjunking kaj dekelkaj virinoj-membroj de la memdefenda taĉmento ŝteliris al la interspaco de la du punktoj de la malamikoj kaj pafis jen en tiu direkto jen en alia, kio tute konsternis la malamikojn. Krome, ili eksplodigis petardojn en ladsitelo, tiel ke ili krakadis kvazaŭ maŝinpafado. Tio ŝajnis al la malamikoj, ke venis ĉefa trupo de la Okavoja Armeo kaj ili senĉese pafadis ĉiudirekten. Tiam He Gjunking kaj aliaj membroj de la memdefenda taĉmento jam iris malproksimen kaj tie ĝoje mokis la malsaĝajn malamikojn en blinda pafado.

Naciperfidulo en Ĉang-an-vilaĝo, ĉefo de ordokonserva organizo, faris multajn malbonojn. Iun profundan nokton, He Gjunking kaj kelkaj kamaradoj venis en la hejmon de la naciperfidulo kaj eskortis lin kun pafilo ĝis tombejo sude de la

vilaĝo kaj tie avertis lin: “Se vi plue faros malbonojn, ni mortigos vin per la pistolo!” Li tremis tra la tuta korpo kaj diris: “Taĉmentestro, taĉmentestro, mi ne plu faros, indulgu min! indulgu!” He Gjunking ja estis tia heroino, kiun malamikoj tre timis je mencio de ŝia nomo.

Senĉese disvolviĝis la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la supera instanco de la Partio transdiris la instrukcion pri longdaŭra milito. Por batali kontraŭ la malamikoj, la popolo de la centra Hebej kreis faman tunelan militon sur la vasta ebenejo. En Ĉang-an-vilaĝo tuneloj ligis ĉiujn domojn kaj stratojn, kiuj formis ŝtalan subteran citadelon.

La batalo fariĝis pli kaj pli malfacila. En printempo de 1943, japanaj diabloj komencis ferocan “balaadon” sur la ebenejo de la centra Hebej. La malamikoj starigis densajn fortikigitajn punktojn kaj reduitojn. En la kruela situacio, la laboroj de Song Hinĵu kaj He Gjunking estis publikaj. Kiam venis malamikoj, ili tuj iris en tunelojn. Kaj tiu de Hju Jugie estis nepublika, tial ŝi respondecis pri ŝirmo de aperturoj de tuneloj, protekto de kamaradoj kontraŭ malamikoj. Tio estis afero pli danĝera. En iu mateno, apenaŭ Hju Jugie eliris el sia hejmo, ŝi aŭdis kelkajn pafojn ekster la vilaĝo. Tuj poste aŭdiĝis krio: “Venis la diabloj!” Ŝi haste revenis hejmen kaj kovris la aperturon de la tunelo. Tuj post kiam ŝi foriris, grupo da diabloj svarmis en ŝian hejmon sub la konduko de naciperfidulo. Ili trovis la aperturon.

Starante ĉe la aperturo de la malluma tunelo, neniu el la malamikoj kuraĝis eniri. Ili longe kriegis ĉe ĝi, sed neniu eliris. Ili disrompis kaldronojn, bovlojn, kulerojn, ĉerpilojn, potojn, vazojn kaj ĉiujn objektojn en la domo de Hju Jugie. Vidante, ke baldaŭ vesperiĝos, la malamikoj foriris deprimite. Hju Jugie rapide revenis hejmen kaj ŝi trankviliĝis vidinte, ke He Gjunking kaj la kamaradoj de la gerila taĉmento de distrikto jam iris el la tunelo kaj ne okazis al ili io malbona. Tamen kuiriloj kaj mebloj en la domo de Hju Jugie estis terure ruinigitaj de la diabloj. Ĉiuj tre indigniĝis kaj diris grincante per la dentoj: “Ni nepre forte batos tiujn aĉulojn!”

Malgraŭ tio, Hju Jugie laboris ankoraŭ pli energie. Ŝi pensis nur pri revolucio, pri venko super la japanaj diabloj kaj pri la emancipiĝo de malriĉuloj. En la rezisto kontraŭ “balaado”, vigle leviĝis amasa kampanjo de armeaniĝo sub la gvido de partia organizo. Hju Jugie la unua

persvadis siajn edzon kaj bofraton en la Okavojan Armeon.

Iun tagon en frua aŭtuno de tiu jaro, Hju Jugie iris falĉi fagopiron, konfidinte fileton Ningĉjo al filino Lanjo. En tiuj tagoj, ŝin tre ĝojigis la informoj pri venkoj de la Okavoja Armeo. Kaj ŝi tre emociiĝis ĉiam, kiam oni laŭdis bravecon de ŝia edzo en bataloj. Ŝi pensis, ke lia braveco venis de instruo kaj eduko de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, kaj de la hardiĝo en multaj bataloj. Pensante pri tiuj aferoj, ŝi falĉis pli rapide. Post longa falĉado ŝi levis la kapon kaj viŝis ŝviton sur ĝi. Subite alkuris haste ŝia filino kaj kriis ploure: “Panjo, hejmen!...” Hju Jugie ekstremis en la koro kaj demandis: “Kio?” La filino eklamentis kaj diris: “Paĉjo martiriĝis!”

Kia malfeliĉo, ke mortis la edzo! Ŝi sentis, ke ŝi perdis ne nur edzon, sed ankaŭ kunbatalanton en revolucio. Oni sciis, ke ŝi estas tre firma. En tia momento ŝi montris pli firman volon de komunisto. Ŝi ĵetis rigardon al Song Hinĵu, He Gjunking kaj aliaj samvilaĝanoj kaj diris: “Sango de mia edzo ne devas esti oferita vane! Ni venĝos. Sub la gvido de la Partio, mi revolucios ĝis la lasta spiro.” Kun neretenebla indigno ŝi denove komencis batalon kune kun la amasoj.

GVIDANTOJ SUR LA SOCIALISMA VOJO

En 1945, triumfis la Kontraŭjapana Rezistmilito, sed la kuomintangaj reakciuloj komencis enlandan militon kun la intenco kapti fruktojn de la venko. Kvankam la forto de Kuomintango ne povis atingi la revolucionan bazon Ĉang-an-vilaĝo, tamen bienuloj kaj kulakoj en la vilaĝo estis tre arogantaj. La komunistoj kaj malriĉaj kamparanoj firme kondukis batalon de agrara reformo por plifortikigi la bazon kaj helpi la fronton.

Komenciĝis la arda movado de agrara reformo. Song Hinĵu, Hju Jugie kaj He Gjunking partoprenis en la Asocio de Malriĉaj Kamparanoj. Sub ilia gvido la amasoj batalis kontraŭ bienuloj kaj tiranoj, kio forte batis la arogantecon de tiuj malbonuloj kaj kuraĝigis laborantajn malriĉulojn.

En distribuado de agroj la tri komunistinoj estis tiel okupataj, ke ili eĉ ne havis sufiĉan tempon por manĝi kaj dormi, nek zorgi pri sia familio. Song Hinĵu ofte lasis sian 9-jaran filon Hiaŭniu prizorgi 4-jaran filineton Nuannjo. La infanoj ofte dormis surtere, kiam ili laciĝis post ludado. Nuannjo malsaniĝis, kaj Song venigis sian patrinon por prizorgi la infanon kaj ŝi mem iris por daŭre

labori. La malsano de ŝia filineto fariĝis pli kaj pli serioza. Iun tagon, ŝia patrino diris al ŝi: "Hodiaŭ la infano fartas tre malbone, do vi restu hejme por prizorgi ŝin." Karesante la kapon de la filineto, ŝi pensis en si: Nun la laboroj estas multaj kaj kiel mi povas ilin forlasi. Ŝi diris al sia patrino: "Hodiaŭ estos kunveno de la tuta vilaĝo por distribui la fruktojn de la venko. Mi revenos post tio." Sed ĝuste en tiu tago, mortis ŝia filineto.

La morto de ŝia filineto tre ĝojigis la klasajn malamikojn. Ili malice agitadis: "Song Hinĵu tuttage revolucias kaj batalas, kaj pro tio ŝia filino mortis; hm, nun ĉu ŝi ankoraŭ revolucios?" Aŭdinte tiujn malicajn vortojn, ŝi ekpleniĝis de indigno. Ŝi pensis: Ni malriĉuloj ne povos emancipiĝi, se ni ne batalos kontraŭ vi, bienuloj kaj tiranoj sangsuĉantaj! Mi partoprenis en la Partio ja por revolucio. Mi batalos ĝis la liberiĝo de la tuta homaro.

En 1950, rapide disvastiĝis tra Ĉang-an-vilaĝo la informo, ke Song Hinĵu kaj aliaj starigos agrikulturan kooperativon. Antaŭ tio, Song Hinĵu, Hju Jugie, He Gjunking kaj aliaj jam starigis interhelpan grupon el dekelkaj personoj. En la grupo ne estis fortulo, ili do pene laboris por venki malfacilojn. En la kampoj de la grupo plantaĵoj kreskis tre bone.

Interhela laborgrupo estas ĝermo de kolektivigo. La interhela grupo de Song Hinĵu fariĝis pli kaj pli prospera. Poste iliaj teroj kaj agri-

kulturiloj partoprenis en kooperativo kaj efektiviĝis kolektivigo de produkta rimedo. De tiam ili surpaŝis la socialisman vojon. En komuna laboro ili konstruis sian vilaĝon per siaj diligentaj manoj.

Ĉiumatene, kunportante manĝaĵojn, Song kaj aliaj kooperativanoj iris al la kampoj kaj komencis ardan laboron de plugado. Dum plugado Song eksplikis al aliaj la alvokojn de Prezidanto Maŭ kaj la belan perspektivon de socialismo. Ŝia parolo inspiris la kooperativanojn kaj tiuj diris: "Maljuna Song, vi konduku nin, kaj ni iros la larĝan vojon de socialismo definitive!"

Tiam vere troviĝis multaj malfaciloj. La kooperativo ne havis monon, do ili vendis siajn private bredatajn porkojn kaj kokovojn kaj disponigis la akiritan monon al la kooperativo. Dank' al unuanima klopodo ilia kooperativo fariĝis ĉiam pli prospera.

En la jaro 1958 de la granda impeto stariĝis popola komunumo. Song Hinĵu estis elektita kiel vicestro de la komunumo. Por ŝanĝi la fizionomion de sia hejmloko, ili kondukis akvoutiligajn konstruaĵojn, reformis la grundon, ebenigis kaj ordigis la kampojn. Ili prenis Daĝaj kiel sian ekzemplon. Senĉese noviĝis la spirita fizionomio de la vastaj amasoj de komunumanoj. La produktokvanto de greno grandiĝis jaron post jaro. Ili senĉese antaŭenmarŝas sur la vasta vojo montrita de Prezidanto Maŭ!

Song Hinĵu, Hju Jugie kaj He Gjunking en kolektiva produktado.



VETERANAJ BATALANTOJ DE DAŬRA REVOLUCIO

La Granda Proletara Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidata de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ fajre disvolviĝis en Ĉang-an-vilaĝo. La ŝtormo de amasa batalo forĝis la ruĝan koron.

Iun vesperon, sur la indiga firmamento glimbrilis la steloj. En la malluksa domo de Song kunvenis la partia filio. Ili diskutis kiel ili devas renkonti la Grandan Proletaran Kulturalan Revolucion. El la 7 membroj de la partia filio 6 estis maljunaj. Ili decidis strikte sekvi la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ, konduki ĝis fino la kulturalan revolucion kaj altigi sian konscion de daŭra revolucio en la granda amasa movado.

La kunveno daŭris ĝis noktomezo. Post la kunveno Song Hinju pensis en si: En Ĉang-an-vilaĝo mi faris revoluciajn laborojn 30 jarojn de la Kontraŭjapana Rezistmilito ĝis la kultura revolucio, mi kreskis de ordinara kamparanino en baznivelan kadron. En miaj laboroj certe troviĝis mankoj kaj eraroj kaj mi nepre devas akcepti kritikojn de la amasoj kaj fari seriozan korekton.

Je la sekvinta tago, en la kunveno de komunumanoj, Song Hinju sincere petis komunumanojn doni al ŝi kritikojn. Ŝi vizitis malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn en iliaj hejmoj unu post alia por peti iliajn kritikojn.

La ŝtormo de la Granda Proletara Kultura Revolucio edukis kaj hardis Song, Hju kaj He. En 1969 ili estis elektitaj kiel gvidantoj de la brigado kaj produkta grupo.

En la sekvinta tago post la fondiĝo de la revolucia komitato de Ĉang-an-brigado, alvenis la informo pri la venka kunvoko de la 9-a Kongreso de la Partio. La malgranda vilaĝo ekbolis de ĝojo.

En tiuj tagoj Song Hinju ofte konsideris pri la problemoj kiel efektiviĝi la alvokon de la 9-a Kongreso. Prezidanto Maŭ elmetis la revolucion linion **“Unuiĝu por gajni ankoraŭ pli grandajn venkojn”**, kaj la komunistoj devis plenumi la revolucion linion de Prezidanto Maŭ kaj pli bone konstrui socialismon kune kun la vastaj amasoj de komunumanoj.

En la revolucia komitato de la brigado estis membro juna. En la akra batalo de la kultura revolucio, li havis opinion malsaman al tiu de Song Hinju. Nun li devis gvidi la brigadon kune kun ŝi. Li havis skrupulon: “Ĉu ni povos labori en harmonio? Ĉu ŝi ne ĉikanos min?...” Ĝuste en tiu tempo li faris eraron dum putofosado: Sen interkonsiliĝo kun la brigada revolucia komitato li mem decidis lui kamionon por transporti sablon. Tio ne nur malŝparis monon, sed ankaŭ malobservis la principon de demokratio. Iuj diris, ke li intence malŝparis monon. Sed informiginte pri tio, Song faris interparolon kun li kaj pridemandis lin pri malfaciloj en la laboro. Ŝi diris: “Ankaŭ mi estas kulpa pri via eraro. Ĉar mi estas estro de la revolucia komitato. Antaŭe ni malmulte diskutis pri la putofosado. Poste ni devas interkonsiliĝi pli multe.” Aŭdinte ŝian parolon, la juna membro preskaŭ larmis pro kortuŝiĝo. Li diris: “Maljuna Song, via pacienca helpo ne nur malkovris al mi la eraron, sed ankaŭ forigis mian skrupulon. Vi ja decideme plenumas la linion de Prezidanto Maŭ pri unuiĝo kaj venko.”

Tiel multaj estas la rakontoj pri la tri maljunaj komunistoj, kiel la sennombraj koniferoj kaj poploj sur la ebenejo de la centra Hebej. Ĉiam brilas la juneco de komunistoj en la revolucia afero de la proletaro!

Song Hinju, Hju Jugie kaj He Gjinking interparolas kun komunumanoj dum laborpaŭzo.





Antaŭe Sklavo, Hodiaŭ Mastro

BA SANG

MI naskiĝis en familio de sklavo en Gongga-gubernio, Tibeto. Sub la reakcia feŭda servuta sistemo, mi laboris kiel sklavino dum 9 jaroj kaj baraktadis en mizera vivo. En 1956, mi fuĝis el la tigra nesto, trovis la karan Ĉinan Popolan Liberigan Armeon kaj estis liberigita. Poste, la Partio kulturis min en kompartianon kaj kadron.

La 1-a de oktobro de 1966 estas tago neforgesebla por mi dum la tuta vivo. Tiutage, mi suriris Tian-anmen-pordegon kiel reprezentanto de naci-malplimulto en la mitingo de nia ĉefurbo por celebri la Nacian Feston kaj unuafoje mi vidis Prezidanton Maŭ, la grandan gvidanton de niaj ĉiuj naciecoj. Kiam mi feliĉe premis la manon de nia amata gvidanto, mi emociiĝis ĝis larmoj kaj esprimis al li nian firman decidon: “Ni miliono da liberigitaj tibetaj servutuloj ĉiam revoluciados sekvante vin!”

En la feliĉa momento, denove aperis la travivitaj tragikaĵoj antaŭ miaj okuloj: En tiu tempo, sub la regado de la reakcia loka registaro de Tibeto, la nobeloj kaj temploj, miaj familianoj vivis kiel sklavoj, de generacio al generacio. Ni havis buŝon, sed ne rajtis paroli; ni havis kruojn, sed ne rajtis libere iri. La bovoj kaj ĉevaloj de la mastrosinjoro manĝis sekalon kaj pizon, sed ni devis nin vivteni per sovaĝaj legomoj. Miaj patrino kaj frateto mortis de malsato, tiam la mastrosinjoro forprenis mian pliaĝan fratinton kiel “pagon de morto-imposto” kaj devigis min servi kiel ilia sklavino. La agento

de la mastrosinjoro malice diris al mia patro: “Ba Sang naskiĝis kiel nia sklavino. Se vi aŭdacus malobei, ni tuj ĵetus vin en karceron kaj fortrenus ŝin ligite sur ĉevalvosto.”

Kiam mi estis 9-jara, mi estis eskortita al la domo de la mastrosinjoro por servi lian edzinon Ĝuoma kaj lian filinon kiel sklavino. Ĉe ili ĉiutage mi estis terure turmentata per batoj kaj insultoj. Se la alportita butera teo estis tro varma, akceptinte ĝin la kruela Ĝuoma ĝin ĵetis sur mian vizaĝon; se ĝi estis iom malvarma, ŝi min batis per ledboto. Mi ĉiam havis sur mi bluajn kaj purpurajn kontuzitajn makulojn kaj la tuta korpo doloris al mi kiam mi kuŝiĝis por dormi. En frosta vintro, mi surhavis nur ĉifonan tibetan robon kaj dormis tremante sur pecoj da planko-viŝtukoj kvazaŭ sur glacio. Ĉiu-vespere, Ĝuoma kutimis preĝi antaŭ enlitiĝo kaj mi devis masaĝi ŝian dorson per frapetado genuante post ŝi. Kelkfoje, kiam mi ekdormetis pro laĉiĝo, Ĝuoma tuj deprenis longan kudrilon de sur sia kolumo kaj forte pikis per ĝi mian kapon, tiel ke mi ofte sangis kaj sentis kapturiniĝon. La sklava vivo de naŭ jaroj turmentis min preskaŭ ĝis morto.

En 1956, mi fariĝis 18-jara. Iutage en la sepa monato laŭ la tibeta kalendaro, mi svenis de kruela batado de la filino de Ĝuoma. (Kvankam Tibeto estis pace liberigita en 1950, sed en 1956 ankoraŭ ne efektiviĝis demokratia reformo kaj la loka registaro, nobeloj kaj temploj ankoraŭ tiranis super la servutuloj.) Nokte, malvarmeta vento vekis min.

Mia tuta korpo estis kovrita de vundoj kaj sangmakuloj. Tiam mi ekmemoris la karajn ĈPLA-anojn, kiuj en 1954 garnizonis en nia vilaĝo kaj rakontis al ni pri revolucio de malriĉuloj, sed baldaŭ translokiĝis al alia vilaĝo. Mi decidis forfuĝi el la domo de la mastrosinjoro en risko de mia vivo por serĉi la popolan liberigan armeon. Iu-espere, profitante momenton kiam la familianoj de la mastrosinjoro regalis gastojn per festeno kaj amuzado, mi forfuĝis. Mi iradis 5 tagojn kaj 6 noktojn spite al turmento de malsato kaj finfine trovis sopiratajn ĈPLA-anojn ...

Tiam mi ricevis novan vivon. En la komenco mi fariĝis laboristino, kaj poste en aŭtuno de 1957, la Partio sendis min al la nacia instituto por lernado. Tie mi lernis politikon kaj legadon kaj akiris sciojn pri revolucio kaj mia klasa konscio altiĝis iom post iom.

En somero de 1959, mi revenis al Tibeto, partoprenis en la batalo kontraŭ la superula reakcia kliko

de Tibeto kun Dalaj kiel la ĉefo kaj en la movado de demokratia reformo por renversi la reakcian servutan sistemon. En la movado mi estis hardita, mia politika konscio altiĝis kaj mi glorie aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio.

Poste, mi laboris kiel estrino de la virina federacio kaj vicestro de Langhian-gubernio de Tibeto. Estis multaj malfaciloj por mi en plenumo de la laboroj de gvidanto. Rimarkinte ke mi havas iom da timo al la malfaciloj, gvidanta kamarado de la partia komitato de la gubernio kuraĝigis min dirante: "Revolucia kapablo estas elkulturita en praktika batalado. Praktiko en batalo estas tre bona lernado; se revolucia kadro volas servi al la popolo, li do ne devas timi malfacilojn sed devas kuraĝi preni al si pezan taskon."

Tion aŭdinte, mi opiniis ke la vortoj de la gvidanta kamarado estas pravaj. Tio ke la Partio asignis al mi gravan taskon ja signifas ĝiajn konfidon kaj

Ba Sang inter komunumanoj



provon al mi. Por la revolucio, mi devas preni sur min taskon kiel ajn peza ĝi estas.

En somero de 1963, en nia gubernio okazis sekegeco. Mi iris al la vilaĝo Badeng de Langcunhiango por batali kontraŭ sekegeco kun la amasoj. Tiu vilaĝo kun 17 familioj estas izola montvilaĝeto. Veninte al la vilaĝeto mi trovis, ke tie ne bone iras la produkta laboro, kaj la amasoj laboras ne tiel entuziasme. Mi do kunvokis kunvenon por mobilizi la amasojn por konstrui irigaciajn kanaletojn. En la kunveno multaj esprimis aprobon al la afero, sed poste neniu iris al laboro kaj la tuta vilaĝo restis en malfervoro. Mi ne povis trovi, en kio kuŝas la kaŭzo.

Mi venis en la domon de liberigita servutolino Cijen Ĝuoma. En la komenco, ŝi nenion volis diri. Mi do helpis ŝin en portado de akvo kaj zorgado de infano kaj starigis amikecon kun ŝi en laboro. Fine ŝi diris al mi la veron. En tiu vilaĝo sin trovis reakcia lamao, kiu klopodis en koluzio kun agento de mastrosinjoro korupti kadrojn kaj minaci vilaĝanojn; kaj utiligante la restantan feŭdan superstiĉon de la amasoj, li dissemis la mensogon, ke la senpluveco okazis pro kolero de dio kaj ĝi estas nevenkebla per homaj klopodoj, kaj diris, ke kiu ne obeis lin, li malbenis lin. Informiĝinte pri tio, mi diris al Cijen Ĝuoma: “Ni tibetanoj kredis diojn por multaj generacioj, sed kion bonan ili donis al ni? Nenion! Ni liberiĝis kaj fariĝis mastroj nur post la alveno de la Komunista Partio. Ni devas kredi la Partion kaj Prezidanton Maŭ.” Samtempe kun tio, mi klopodis liberigi la amasojn de superstiĉo per edukado kaj malkaŝis la trompon de la reakcia lamao. Dank’ al la klasa edukado, la amasoj estas mobilizitaj. Ili malkaŝis multajn krimojn de la reakcia lamao kaj la agento de la mastrosinjoro. Sankciite de la supera instanco, ni kunvokis mitingon kaj faris batalon kontraŭ la reakcia lamao. La amasoj entuziasmiĝis, rapide konstruis du grandajn irigaciajn kanalojn kaj solvis la problemon de irigaciado al la grenplantaĵoj de la tuta vilaĝo. Post tiu okazaĵo mi profunde konis, ke ni povas bone plenumi la laborojn de produktado kaj konstruado nur se ni neniam forgesas klasan batalon.

Langhian estas subevoluinta regiono. Kvankam la produkto rimarkinde disvolviĝis post la demokratia reformo, tamen ankoraŭ estis multaj malfaciloj en aliaj konstruadoj pro malfacila trafikado. En aŭtuno de 1965, la ŝtato decidis konstrui ŝoseon en nia gubernio. La partia komitato de la gubernio asigis al mi la taskon, ke mi

gvidu pli ol 1500 popolanojn en konstruado de la ŝoseo. Laŭ la instrukcio de la partia komitato de la gubernio kaj mia labora sperto en la pasinteco, mi opiniis, ke necesas bone mobilizi la amasojn ideologie por bone plenumi la taskon de konstruado de la ŝoseo. Alveninte al la konstruejo, unuflanke ni aranĝis por la laborantoj studon de verkoj de Prezidanto Maŭ, kaj aliflanke ni faris klasan edukon kompari la malnovan socion kun la nova. La plejparto de la vojkonstruantoj devenis de servutuloj kaj sklavo kaj ĉiu el ili havas familian historion plenan de mizero kaj suferoj. En la malnova socio, Langhian-gubernio estis surtera infero. Ne havante sekalan farunaĵon por manĝo, ili satigis sin per sovaĝaj legomoj. Ne havante krudan lanŝtofon por fari veston, ili sin ŝirmis per arboŝelo. Iuj familioj prenis foliojn kaj ŝelojn de arboj kiel teon. Nun la plejparto de kampoj de Langhian-gubernio povas esti memflue irigaciata, ĉiujare kreskas la produktokvanto de greno kaj la vivo de la amasoj multe pliboniĝis. Rememorante la suferojn en la malnova socio kaj pensante pri la hodiaŭa feliĉo, la vojkonstruantoj ĉiuj kore dankis la Partion kaj Prezidanton Maŭ kaj estis tre entuziasmaj en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ. Tage dum laborpaŭzo mi helpis ilin studi la artikolojn «Servu al la Popolo», «Memore al Norman Bethune» kaj «Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo»; vespere, ili kolektiĝis en la tendo kaj petis min klarigi por ili verkon de Prezidanto Maŭ. Dank’ al la lernado, ili akiris pli profundan komprenon pri la signifo de la konstruado de la ŝoseo. Kvankam iuj el ili ricevis sang-vezikojn surpiede dum dorsportado de instrumentoj kaj materialo por vojkonstruado, tamen ili ne ripozis. Dum la konstruado, kiam ili renkontis malmolan rokmuron, ili organizis sturman grupon por ĝin forigi per dinamito kaj garantiis glatan iradon de la konstruado.

En la pasintaj dekelkaj jaroj, sub la gvido de la Partio mi persistis en klasbatalo kaj produkta batalo kune kun la amasoj, plialtigis iom post iom mian klasan konscion kaj laboran kapablon kaj kreskis de ordinara liberigita sklavo en kadron de nacimalplimulto. En 1968, fondiĝis la revolucia komitato de la Tibeta Aŭtonoma Regiono kaj mi estis elektita kiel ĝia vicestro. En 1971, mi estis elektita kiel sekretario de la partia komitato de la aŭtonoma regiono.

Ĉiufoje, kiam mi retrorigardas la trairitan vojon en mia kreskado, mi sentas fortan emocion. En la estonto, mi diligente studos verkojn de Prezidanto Maŭ en praktika batalo kaj ĉiam restos fidela al la Partio kaj la popolo.

Dediĉi Mian Tutan Vivon al la Higiena Afero de la Patrio

MARŜAS nia socialisma Patrio. Kiel ginekologo mi vivis 50 jarojn en la malnova Ĉinio kaj 22 jarojn en la nova Ĉinio. Forte mi emociiĝas, kiam mi rememoras mian personan travivaĵon kaj vidas propraokule la rapidan disvolviĝon de la higiena afero kaj aliaj aferoj de nia lando. Mi ofte rememoras miajn pasintaĵojn de 50 jaroj en la malnova socio, kio plifirmigas mian decidon diligente labori por la ginekologia afero de la Patrio.

En la aĝo de 19 jaroj, mi unuope venis de mia hejmloko Fugian-provinco al Pekino kaj sukcesis trapasi eniran ekzamenon de la Pekina Unia Medi-

cina Kolegio establita de usonanoj. Tiam Ĉinio estis duonfeŭda kaj duonkolonia socio. Sub la tretado de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo, la laboranta popolo vivis en mizero kaj la virinoj estis pli malestimataj. Katenate de la vidpunktoj de "frateco" kaj "humaneco" propagandataj de la burĝaro, mi deziris fariĝi bonulo kiu povas helpi kaj savi aliajn, tial mi elektis la medicinon kiel studobjekton por fariĝi "bonkora" kuracisto. Mi diligente lernis kaj akiris iujn sukcesojn en ginekologio, tamen en la malnova socio mia deziro projekti virinojn ne estis realigita.



Lin Kiaŭĝi instruas kamparanajn kuracistojn.

La Ĉefurba Hospitalo, kie mi laboras, antaŭe estis nomata «Pekina Unia Medicina Kolegia Hospitalo». En 1916, Rockerfeller, magnato de petrolo kaj monopola plutokrato de Usono daŭrigis ĝian funkciadon post britaj kaj usonaj eklezioj. Kial usonanoj funkciigis en Ĉinio hospitalojn? Ĉu ili vere celis “filantropion” kaj “amikecon”? Kompreneble ne. La usona imperiisto, pasinta vicdirektoro de la hospitalo Rogers Greene mem konfesis: “Ni kredas, ke por Ĉiang-registaro, helpo de miliono (da dolaroj) al universitatoj naskas multe pli grandan forton ol helpo de du milionoj (da dolaroj) al ĝia armeo. . .” El lia parolo ni povas facile vidi, kia varo estas la “filantropio” kaj “amikeco” kiujn ili montris al la ĉina popolo.

Antaŭ 30 jaroj, usonano Richard S. Lyman, direktoro de neŭrologia fako aŭdis ke iu medikamento povas distingi veran epilepsion de falsa, kaj faris eksperimenton sur psikozaj malsanuloj. Baldaŭ post injekto de la medikamento tiuj malsanuloj suferis teruran turmenton. Iuj el ili firme kunpremis la dentojn ĝis rompiĝo kaj aliaj gratvundis sin. En teruraj krioj Lyman filmis la harstarigan teruran scenon kaj verkis medicinan disertacion. La konkludo de lia disertacio diris: “Tiu medikamento ne povas distingi epilepsion veran de falsa, sed nur povas eksciti epilepsion por ebligi observadon.” Por esplori ekzanteman tifon kaj rekurantan febron, alia usonano Lantaoer, esploristo de la Fonduso de Rockerfeller, ligis sur ĉinajn infanojn skatolon entenantan pedikojn. Mordate de pedikoj, tiuj trompitaĵaj infanoj febris kaj suferis netolereblan turmenton. Eksperimentoj sur ĉinoj estis nenombreblaj kaj multaj ĉinoj estis murditaj en bakteria eksperimento de la lupoj sub la mantelo de usona “kuracisto”.

Sed estas malpermesate retroirigi la historion. Fine venis la nova epoko kun giganta ŝanĝo.

En 1949, la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ solene deklaris al la tuta mondo: “**De nun jam ekstaris la ĉinoj.**” De tiam mi komencis novan laboron kiel mastro de la socialisma socio. Nur tiam mi komprenis, ke la deziro fariĝi “bonkora” kuracisto estas superklasa. Dank’ al la senĉesa edukado de la Partio, mi komprenis, ke mi devas servi al la vasta laboranta popolo kaj kontribui mian forton al la konstruado de la Patrio.

En printempo de 1965, mi unuafoje partoprenis rondiran kuracon en kamparo de Hiangjin-gubernio de Hunan-provinco. Mi unuafoje vidis la noblan kvaliton de la laboranta popolo. Mi

Sur kota vojo al malsana kamparano



pensis: “Ĉiuj niaj manĝaĵoj kaj vestaĵoj devenas de la kamparanoj, se ne al ili, do al kiu ni servu?” Sed en tiu tempo mi havis multajn malnovajn pensojn. Dum la kuracado en la kamparo, kamparanoj tre estimis min kaj donis al mi multajn zorgojn kaj favorojn. Kaj unu okazaĵo profunde edukis min.

Iufoje, mi iris akuŝigi virinon. Kune kun mi iris ankaŭ tiea juna sanitaristino kiu lernis ĉe mi. Ni piediris al la akuŝontino kaj trovis ke ankoraŭ ne venis la tempo de akuŝo kaj mi iom malpacienĉigis. Mi estis kuracisto invitita, sed la sanitaristino sentis sin kvazaŭ hejme. Ŝi vektoportis akvon, hejtis la fornon kaj poste lavis vestojn por la akuŝontino. Mi estis kortuŝita de ŝia faro. La knabino rigardis la akuŝontinon kiel sian familianon, tre zorgis pri ŝia farto kaj helpis ŝin en mastrumado. Kvankam tio estis bagatelo, tamen mi ne povis agi kiel ŝi. De tiam mi amikiĝis kun la junulino. Mi estis ŝia instruisto kaj ŝi estis mia edukanto. Mi lernis de ŝi bonan kvaliton servi tutkore al la popolo. De tiam ni korespondas kaj nun ŝi jam fariĝis lerta kuracistino.

Dank' al la Granda Proletara Kultura Revolucio, mi pli profunde komprenis, ke ni devas servi al plejparto de la homoj kaj apogi nin sur la amasoj en

Lin Kiaŭĝi diagnozas malsanon de kamparanino.



laboro. En 1970, oni alsendis de Ŝandong-provinco avinon kun la aĝo de ĉ. 70 jaroj. Ŝi havis grandan tumoron en la ventro. Mi laboris pli ol 40 jarojn kiel kuracisto, tamen malofte renkontis tian kazon. Ni pretigis al la malsanulino apartan ĉambbron kaj fluidajn manĝaĵojn. Por akiri pli precizan diagnozon, ni faris je ŝia abdomeno punkciojn. Sed post nur du tagoj ŝi petis resendi ŝin hejmen. Kial? Ĉu nia prizorgo al ŝi ne estas entuziasma kaj kontentiga? Dum interparolo mi sciigis, ke ŝi ne kutimis al nia prizorgado kaj la punkcioj ŝin timigis. Ni paciencie kuraĝigis ŝin. Poste ni mobilizis la kuracistojn kaj flegistinojn, por ke ili liveru bonajn ideojn kaj projektojn. Fine ni sukcese enuklei al la avino la ovarian tumoron kun la pezo de 25 kg. Reveninte hejmen, la avino sendis per poŝto bakitajn kukojn kaj arakidojn por esprimi sian sinceran dankon. Kiam ni gustumis la donacajojn de la avino, ni sentis neesprimeblan ĝojon.

En la malnova Ĉinio estis tre postĝinta la nivelo de niaj scienco kaj tekniko, sed nun ili rapide disvolviĝas en nia socialisma Patrio. Koncerne al la medicina scienca esploro, la ginekologia kaj obstetrika fako de nia hospitalo faris esploron pri koriokarcinomo kaj maligna molo. Koriokarcinomo estas danĝeriga maligna tumor, pli ol 90% de la suferantoj de tiu malsano mortas. Tio serioze minacas la virinojn. Antaŭe ni ĉefe kuracis laŭ la malnovaj metodoj kaj la rezulto ne estis kontentiga. En 1958, puŝate de la situacio de la granda impeto, ni decidis esplori metodon por kuraco de koriokarcinomo. Post esploro kaj praktikado de kelkaj jaroj, fine ni trovis novan metodon por kuraci tiun malsanon. En la lastaj jaroj, la efiko de tiu metodo pluapasa altigis.

En la nova Ĉinio, la Partio kaj la popolo donis al la intelektuloj grandan fidon kaj honoron. Nun mi estas direktoro de la ginekologia kaj obstetrika fako de la Ĉefurba Hospitalo kaj membro de la konstanta komitato de la Tutlanda Popola Kongreso. Kvankam mi jam havas la aĝon de 70 jaroj, tamen mi sentas, ke mi fariĝas pli kaj pli juna. Mi decidis pli bone servi al la popolo kaj fari kontribuojn al protektado de la sano de virinoj.

Feliĉa Vivo de Infanoj en la Nova Ĉinio

Ĝaŭ Ŝuo, kies gepatroj laboras en la Dua Kotonteksa Fabriko de Pekino, en la infanĝardeno de la nomita fabriko.





Ŝminkado antaŭ
prezentado

La danco «Plukado de Tefolioj»
prezentata de nankinaj malgrandaj
ruĝgvardianoj

Malgrandaj pentristoj

Fizika ekzamenado










Infanoj ludas per pendoloj.

Etuloj de la infan-
ĝardeno Bejhaj

Matena gimnastiko en
la infanĝardeno Bejhaj

Helpo al fratineto en manlavado






Malgrandaj ruĝgardianoj partoprenas kamplaboron en komunuma produktgrupo.

ŜENG TONG:

Inĝenierino

Lin Janfang



NELONGE post la fondiĝo de la Nova Ĉinio, Lin Janfang iris labori en la Unua Ilmaŝina Fabriko de Ŝenjang laŭ decido de supera instanco, post diplomiĝo el la Mezĉinia Politekniko. En tiu tempo, ŝi firme decidis fari kontribuon al ŝanĝo de la postiĝinta fizionomio de la gisa industrio de la patrolando. Ŝi kolektis teknikan materialon kaj laboris entuziasme. En la jaro 1959, ŝi kaj du aliaj inĝenieroj decidis ellabori novan teknologion de grafito muldilo por anstataŭigi per ĝi argil-sablan muldilon. En tiu tempo, ili energie laboris super la projekto tri tutajn jarojn en sia laborĉambro, sed kiam ili ĝin aplikis en produkto, ĝi malsukcesis. Pro nekombino de teorio kun praktiko, ŝi iris eraran vojon. Dum la 18 jaroj de esplorado pri gisado, kvankam ŝi verkis kelkajn disertaciojn, faris kelkajn projektojn kaj akiris la titolon de inĝeniero, tamen ŝi faris ne tiel grandan kontribuon al ŝanĝado de la postiĝinta fizionomio de nia gisa industrio.

En la jaro 1968, Lin Janfang venis en la gisan laborejon por ricevi reedukadon de la laboristaro. Tuj post alveno al la entuziasmplena produkta posteno, ŝi estis profunde kortuŝita de la sinforgesa laborado de la laboristoj. En tiu tempo, maljuna laboristo Ĝan Baŭlin kaj kelkaj kamaradoj estis farantaj teknikan renovigon. Pro malbona influo de diversaj malnovaj kutimaj fortoj kaj moko de iuj maliculoj, fine en la eksperimenta grupo restis nur Ĝan Baŭlin sola. Sed li ne timis izoliĝon kaj daŭre persistis en eksperimentado. Vizaĝe al tiu okazaĵo, Lin Janfang ne povis bone ĝin kompreni.

Alifoje, plenigita fer-likvujo pretis por fari gisadon. Subite ĝia direkta rado malbone funkciis kaj sekve de tio la fera likvo elverŝiĝis de 1-metra alto. Ĝi disŝprucis kun fajreroj. En tiu danĝera momento, maljuna laboristo Vang Junhaj forpuŝis la aliajn, laŭte kriante: “Danĝere

ĉi tie, tuj forkuru!” Sed li mem saltis al la ferlikvujo, subtenis ĝin per unu mano kaj kaptis la radon per la alia. La inkandeska ferlikvo karbigis lian veston kaj la varmego dolorigis lian haŭton, sed li firme tenis la ferlikvujojn... Poste, dank’ al helpo de aliaj kamaradoj, la danĝero estis forigita kaj la posedaĵo de la ŝtato sekurigita.

Je tiu okazaĵo Lin Janfang demandis al si mem: Ĉu mi povas tion fari?

En la tagoj de kunestado kun la laboristoj, iliaj vortoj kaj agoj edukis Lin Janfang. Ŝi pensis: Kial majstro Ĝan ne timis izoliĝon kaj persistis en eksperimentado? Kial majstro Vang ne timis la danĝeron kaj rapidis por savo? Ĝuste pro tio, ke ili havas firman proletaran starpunkton, havas profundan sentimenton de la proletaro al siaj kamaradoj kaj sinforgesan spiriton pro la revolucia afero. Sed en la pasinteco, farante projektadon aŭ verkante disertacion, antaŭ ĉio ŝi pensis pri siaj personaj renomo kaj profito. Kiel granda estas la diferenco inter la laboristaro kun nobla kvalito kaj ŝi mem! El sia propra sperto Lin Janfang pli profunde komprenis, ke la alvoko de Prezidanto Maŭ, ke la intelektuloj iru la vojon de kombiniĝo kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, estas zorgo al ili. Ŝi firme decidis, ke ŝi bone lernos de la laboristaro kaj faros penan hardadon dum longa periodo.

Post nelonge, Lin Janfang petis permeson labori en la gisada sekcio de grandaj maŝinpartoj. Kiam ŝi unuafoje firmigis sablomuldilon per pneŭmata martelo, ŝi baldaŭ sentis siajn brakojn acidaĵ kaj ŝvitis tutkorpe. Lin Janfang faris firman decidon kaj sukcese plenumis la labortaskon.

Por malpezigi la laboron de la gisistoj, Lin Janfang kaj la grupo de teknika renovigo elmetis projekton de nova teknologio “memmalmoliĝa muldado per flua sablo” por eksperimentado.

Tiu propono tuj ricevis aktivan subtenon de la partia organizo kaj la gisistoj.

Ĉiu ajn nova afero naskiĝas neglate. Kiam ili unuafoje faris eksperimenton de gisado, iu oktuna gisaĵo de ilmaŝina korpo estis fuŝita. Tio tuj skuis la tutan fabrikon. Ĉu ili ankoraŭ daŭrigos la eksperimenton en tia cirkonstanco? Tio estis rigora provo al la membroj de la grupo de teknika renovigo kaj precipe al Lin Janfang.

Laboristoj venis unuj post aliaj por helpi ilin en analizado kaj resumado kaj fari proponojn al ili. La kuraĝigo kaj subteno de la amasoj donis al Lin Janfang memfidon kaj kuraĝon por akiri venkon. Sub la helpo de laboristoj, fine la kaŭzo de la fiasko estis trovita. Jam estis profunda nokto. Ŝi ankoraŭ diskutis kun aliaj en laborejo pri rebonigo de la projekto. Fine, ŝi kuraĝe aplikis la praktikan sperton de la amasoj, kaj post ripeta scienca analizado, ŝi decidis aldoni grafitan pulvoron al la sabla muldilo kaj alpreni aliajn efikajn aranĝojn kaj solvis la problemon de algluiĝo de sableroj al kaj ŝrumpiĝo de gisaĵoj.

Dum muntado de la sablotenujo, aperis neatendita problemo. Kvankam la dekliveco de la muroj de la sablotenujo kaj la filtrilo kaj la distanco inter ili jam atingis la limon laŭ la postuloj de la teknologia projektado, tamen la filtrita sablo ankoraŭ ne povis mem flui en la kirlujon. Por solvi tiun problemon, Lin Janfang faris kelkajn projektojn, sed neniu el ili estas ideala. Maljuna laboristo Hju Baŭĝang diris al ŝi: “Dum kribrado de faruno, oni devas frapadi la kribrilon, por ke la faruno ellasiĝi kiel eble plej rapide. Ĉu oni ne povas solvi la problemon per aldono de malgranda vibrilo sub la sablotenujo?” Lin Janfang serioze konsideris la opinion de tiu laboristo, rebonigis la projekton kaj rapide sukcesis muntado de la sablotenujo.

Dum prova funkciigo de la nove muntita kirlilo, ofte okazis obstrukciĝo, je kio oni devis haltigi la maŝinojn de la tuta procedo, kaj rampi en ĝin por forigi la obstrukcon iom post iom. Tio ne nur perdigas tempon, sed ankaŭ estas malsekura. Fine tiun malfacilan problemon Lin Janfang solvis denove sub la helpo de laboristo, kiu proponis fari truon al la sablotraflua tubo kaj munti al ĝi klapon por aŭtomata reguligo.

Lin Janfang kaj la aliaj membroj de la projekta grupo sukcesis en eksperimento de memmalmoliĝa muldado per flua sablo kaj rapide aplikis tiun teknologion en produkto en malpli ol duona jaro. De tiam ne nur la gisistoj estis liberigitaj el la peza fizika laboro, sed ankaŭ la produktivo estis altigita.


Tri jarojn post alveno al la laborejo, Lin Janfang kaj laboristoj sukcesis kune ellabori la novajn teknikojn kaj teknologiojn kiel ekzemple memmalmoliĝa muldado per flua sablo, suĉado de ruĝa ŝlimo kaj fandado de fero per karbopulvoro, kaj tiamaniere ŝi faris firman paŝon sur la vojo de kombiniĝo kun laboristoj. Ŝi diris kun profunda kompreno el sia sperto: “Vivante kune kun laboristoj, mi lernis scion neakireblan el libroj kaj desegnis bluplanojn nefareblajn en projekta ĉambro. La intelektuloj povas kontribui sian scion al la revolucia afero, nur se ili, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, iras la vojon de kombiniĝo kun laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.”



NOVAJ ELDONAĴOJ DE ŜANHAJO POR INFANOJ

En la lastaj pli ol unu jaro, Ŝanhajo eldonis pli ol 110 specojn de politikaj, literaturaj, sciencaj-teknikaj kaj aliaj legaĵoj kaj bildlibroj por infanoj. Tiuj legaĵoj, ĉefe prikantantaj herojn inter laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj aperintajn en la tri grandaj revoluciaj movadoj, estas tre bonvenaj al la infanoj.

Inter tiuj infanaj legaĵoj estas kolekto de rememoraĵoj de maljunaj laboristoj pri la malnova socio «Minejo Plena de Indigno», kiu faras klasan edukon al infanoj; «Faroj de la Bona Oka Roto sur Nankinstrato», kiu registras bonajn pensojn kaj bonan stilon de la nomita roto; kolekto de raportaj literaturaĵoj «Ruĝa Flago de Haveno» priskribanta heroajn figurojn de havenaj laboristoj; «Ni Estas Ruĝaj Gvardianetoj de Prezidanto Maŭ», spegulanta la spiritan fizionomion de ruĝaj gvardianetoj; bildlibroj de revoluciaj modernaj teatroj kaj reviziita biblioteko «Cent Mil 'Kial'».



Unu el la laborejoj de la Ŝihezi-a Kotona Ŝpinejo de Hingiang.

Lokaj Industrioj Nove Aperintaj sur la Altebenejoj kaj Stepoj

LA Pamira Altebenejo de Hingiang, Tibeta Altebenejo kaj la Stepoj de Interna Mongolio en nia lando estas riĉaj je mineraloj, kiuj estas ekspluatataj jaron post jaro. Nun pompe disvolviĝas la loko funkciigataj industrioj en tiuj lokoj.

SUR LA PAMIRA ALTEBENEJO

Ĝi situas en la plej okcidenta parto de nia lando, kie loĝas ĉefe ĥalĥazoj kaj taĝikoj. Antaŭe tie ĉi ne troviĝis eĉ unu metiejo. En 1958, sub helpo de



Transistoroj produktitaj de la Hingiang-a Fabriko de Radioriceviloj.

la ŝtato, la popoloj de diversaj nacioj establis nombron da malgrandaj industriaj entreprenoj. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, ili persistis en sinapogo sur la propraj fortoj, venkis malfacilojn de manko de ekipaĵoj kaj konstruaj materialoj kaj konstruis malgrandajn industriajn entreprenojn de karbo, fero, koakso, elektro, cemento, koloraj metaloj, fajrorezistaj materialoj, agrikulturaj instrumentoj, ŝuoj, lanaj litkovriloj k. a. En ravino de la altebenejo sin trovas Kangsu-minregiono de Ĥazlesu-ĥalĥaza Aŭtonoma Subprovinco, kiu antaŭ kelkaj jaroj havis nur unu minejon kaj kelkajn simplajn malgrandajn minejojn. En la kultura revolucio, apogante sin sur la propra forto, ili starigis fabrikojn de fero, koakso, cemento, elektro kaj fajrorezistaj materialoj, konstruis novajn ŝaktojn kaj faris la lokon sinteza minregiono.

Disvolviĝo de lokaj malgrandaj industrioj multe ŝanĝis la malnovan fizionomion de la altebenejo. En 1970, Vuĉa-gubernio establis fabrikon de agri-

kulturaj instrumentoj, kiu povas produkti instrumentojn bezonatajn al la loko. Nun multaj paŝtistoj plugas per fera plugilo anstataŭ la ligna. Ĥazlitakekomunumo, kiu lokas ĉe la piedo de Muztag-Ata-monto alta je pli ol 7,000 metroj super la marnivelo, fondis tri malgrandajn minejojn kaj unuafoje liveris karbon al ĥalĥazaj paŝtistoj, kiuj multajn generaciojn uzis fekajon de bovoj kaj ŝafoj kiel hejtajon. Cetere, per enspezo el ekspluatado de karbo kaj aliaj mineraloj, tiu komunumo aĉetis traktorojn, kamionojn, pneŭmatajn ĉarojn, agrikulturajn insekticidojn, kemiajn sterkojn k. a., kio multe stimulis la disvolvigon de agrikulturo kaj brutobredado. La tieaj paŝtistoj de generacio al generacio lumigadis per ŝafgraso. En 1971, ili konstruis hidroelektran stacion de 36 kilovatoj. De tiam la paŝtistoj ekhavis elektran lampon. Nun multaj komunumoj havas fadenan disaŭdigon kaj paŝtistoj povas rekte aŭdi voĉojn el Pekino, kio riĉigas ilian kulturen vivon.

Antaŭ la Liberiĝo ĥalĥazoj kaj taĝikoj ne havis sian industrian laboriston. Nun, kun la disvolviĝo de la lokaj industrioj, ili ne nur havis laboristojn de siaj nacioj, sed ankaŭ gvidantojn kaj teknikistojn de fabrikoj kaj laborejoj devenantajn de siaj nacioj. Inter ĉ. 2,000 laboristoj de Kangsu-minregiono, pli ol 85 % estas nacimalplimulto; inter la gvidantoj de revoluciaj komitatoj de fabrikoj, minejoj kaj laborejoj, 50 % estas nacimalplimulto.

SUR LA STEPO DE INTERNA MONGOLIO

La Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio ĝis nun jam konstruis malgrandajn entreprenojn de fero kaj ŝtalo, maŝinfabriko, elektro, karbo, kemia industrio k. a. Ĝia ĉefurbo Huhehoto, Ginin, Jikeĝaŭ k. a. lokoj konstruis 4 mezajn kaj malgrandajn entreprenojn de fero, ŝtalo kaj laminatado en la lastaj jaroj. Dank' al disvolviĝo de fera kaj ŝtala industrio, tie stariĝis unu post alia dekoj da grandaj kaj mezgrandaj fabrikoj kiuj povas produk-

ti pezajn maŝinojn, maŝinojn de kaŭĉuka industrio, aŭtojn, traktorojn, dizelojn, elektrajn motorojn, ilmaŝinojn kaj ties akcesoraĵojn. Iuj urboj kaj urbetoj nove konstruis mezajn kaj malgrandajn fabrikojn kaj riparejojn de agrikulturaj kaj brutobredaj instrumentoj. Nun en la regiono estas vaste uzataj la memproduktitaj maŝinoj por semado, falĉado, draŝado, irigaciado, herbofalĉado, fojno-kolektado k.a.

Ekspluati mineralojn estas grava ĉeno por disvolvi industrion. En la lastaj jaroj, la aŭtonoma regiono konstruis minejojn de fero, karbo, kalkŝtono, dolomito, mangano, glimo, asbesto, natura alkalo, sulfuro k.a. Sur la stepo estas multaj salaj kaj alkalaj lagoj, kiuj liveras riĉan fonton al la nove disvolviĝanta kemia industrio.

Nun, samtempe kun disvolviĝo de pezaj industrioj, ankaŭ malpezaj industrioj de la regiono rapide disvolviĝas. Dekoj da branĉoj de malpezaj industrioj de la regiono produktas diversajn objektojn. La specoj de fabrikaĵoj kreskas de malpli ol 100 en la komenca periodo post la Liberiĝo ĝis pli ol 1,700. Prilaboraj entreprenoj de lano, felo, viando kaj lakto, kun lokaj kaj naciaj karakteroj jam povas produkti diversajn drapojn, lanfadenon, pluŝon, lanajn litkovrilojn, serĝon, gabardinon, diversajn ledojn, diversajn ledŝuojn kaj botojn, laktopulvoron, buteron, ladmanĝaĵojn k.a. sume centojn da specoj de objektoj. Krom en la regiono kaj lando, tiuj produktaĵoj vendiĝas ankaŭ en eksterlanda merkato.

En la paŝtregiono, antaŭe ostoj, kapoj, hufoj kaj internaĵoj de brutoj post la buĉado estis forĵetitaj, sed nun estas prilaboritaj en diversajn medikamentojn, metiartaĵojn, vivbezonaĵojn kaj materialojn por kemia industrio. Ĉiujare, paŝtistoj povas enspezi grandan sumon el la vendo de tiuj forĵetaĵoj. En 1970, Vulcanĉapu-ligo, kiu situas meze de la aŭtonoma regiono, konstruis pli ol 600 malgrandajn entreprenojn por produkti feron, ŝtalon, karbon, cementon, kemisterkon, ercojn, maŝinojn kaj diversajn bezonaĵojn. Laŭ nekompleta statistiko, en la lasta jaro nove konstruiĝis 570 malgrandaj fabrikoj en la regiono. Tiuj fabrikoj, utiligante forĵetaĵojn de iuj grandaj fabrikoj, produktas diversajn varojn, kiuj prosperigas la merkaton kaj kontentigas la bezonon de la popolo.

SUR LA TIBETA ALTEBENEJO

Pri la lokaj industrioj de Tibeto ni jam raportis en la 6-a numero de nia gazeto, 1971. En la pasinta

jaro, la lokaj industrioj de tiu regiono akiris novan disvolviĝon. Komencis produktadon pli ol 20 mezaj kaj malgrandaj fabrikoj kaj minejoj, inkluzive tiujn de agrikulturaj instrumentoj, presado, instrumenta formilo, sukero, pilo, sulfata acido, papero, radioaparato, faruno, karbo, nemetala mineralo k.s. Iuj specoj de produktaĵoj povas kontentigi la bezonon de la industria produktado kaj popola vivo de la regiono. 4 el la 6 subprovincoj de la regiono fondis fabrikojn de agrikulturaj instrumentoj, kio akcelis disvolvigon de la tibeta agrikulturo.

La lokaj industrioj de Tibeto disvolviĝis sub intima zorgado kaj subtenado de la Partio kaj la ŝtato. La ŝtato disponigis al la regiono bonajn maŝinojn kaj ekipaĵojn, kaj Ŝanhajo, la Interna Mongolio, Ŝiĉuan, Hejlonggiang, Hubej k.a. sendis al Tibeto laboristojn kaj teknikistojn por helpi la fabrikojn munti maŝinojn kaj ekipaĵojn, kulturi tibetajn teknikistojn kaj laboristojn, kio multe rapidigis la konstruadon de la fabrikoj kaj minejoj.

Tibeta laboristino de la Linĝi-a Lana Ŝpinejo de Tibeto.



La Fera kaj Ŝtala Industrioj de Ŝanhajo en Disvolvo


TRANSPASINTE la sojlon de la jaro 1972, la ŝanhajaj laboristoj de fera kaj ŝtala industrio, same kiel tiuj en aliaj lokoj de nia lando, kun plena fido strebas por akiri ankoraŭ pli grandan sukceson en produkto de fero kaj ŝtalo. En la pasinta jaro, ili antaŭdate plenumis la ŝtatan produktan planon de ŝtalo kaj sukcese provproduktis pli ol 360 novajn specojn de ŝtalo. Nun Ŝanhajo jam unuapaŝe konstruiĝis en bazon de fera kaj ŝtala industrio kun grandaj, mezgrandaj kaj malgrandaj entreprenoj en kombino, kiuj povas produkti multajn specojn de produktaĵoj.

La ŝtala industrio de Ŝanhajo komenciĝis en la fina periodo de la 19-a jarcento. Sed sub la regado de la feŭĉa dinastio kaj la reakcia registaro de Kuomintango, en la pli ol 50 jaroj antaŭ la Liberiĝo, la plej alta jara produktokvanto estis nur iom pli ol 6500 tunoj. Ĝi povis produkti nur du specojn de ordinara karbona ŝtalo kaj pli ol 40 specojn de ŝtala materialo. Nun, la jara produktokvanto de unu konvertora laborejo jam kelkdekoble superis la plej altan jaran produktokvanton de ŝtalo antaŭ la Liberiĝo; la jara produktokvanto de ŝtala materialo antaŭ la Liberiĝo egalas nur al la monata produktokvanto de unu laminata laborejo; nun la specoj de ŝtalo kaj ŝtalaĵoj produktitaj de la tuta urbo egalas al centoj da obloj de tiuj antaŭ la Liberiĝo.


En la komenca periodo post la Liberiĝo, la ŝanhajaj laboristoj de fera kaj ŝtala industrio venkis la malfacilojn de la malnoveco de instalaĵoj kaj nesufiĉeco de materialo kaj disvolvis la produkton. En la dua duono de 1958, tie konstruiĝis nombro da grandaj konvertoraj laborejoj. Ne longe poste, dank' al ripetada eksperimentado, la laboristoj

produktis per konvertoroj novajn specojn de altkvalita ŝtalo kiel ŝtaltabulo por fari profundajn emajlajn vazojn, malaltaloja ŝtalo kaj silicia ŝtalo, kaj tiamaniere levis la ŝtalan industrion de Ŝanhajo al nova nivelo. Nun, ordinara konvertora labo-

Laboristoj de la Kvina Ŝtalfabrika de Ŝanhajo afinacias novan specon de ŝtalo.



La laboristoj de la Ŝanhaja Fabriko de Ŝtalaj Tuboj faris maŝinon por malgrandigi la diamentron de ŝtalaj tuboj.



rejo jam povas produkti kelkdek specojn de ŝtalo por fari elektroveldajn vergojn, agrikulturajn instrumentojn k.a.

En disvolvado de ŝtal-produktado, la laboristoj de tiu industria branĉo de Ŝanhajo disvolvis amasan teknikan renovigon, energie ekspluatis latentajn produktajn fortojn kaj akcelis la disvolvigon de produkto.

Iu elektroforma laborejo de la Kvina Ŝtalfabriko de Ŝanhajo senĉese altigis la produktivon de la ekzistantaj ekipaĵoj kaj akiris sukcesojn. En la jaro 1970, tiu laborejo faris eksperimenton pri grandigo de la kvanto de enmetita materialo kaj sukcese altigis la produktokvanton de ĉiu afinacio je pli ol cent procentoj. Lastatempe, ili resumis sian sperton pri tiu eksperimento kaj plialtigis la kvanton de ĉiu afinacio je 40 procentoj surbaze de la antaŭa atingo. Ili ankaŭ kreis plurajn novajn teknologiojn, multe mallongigis la tempon de fandado kaj malaltigis la konsuman kvanton de elektro por produkto de ĉiu tuno da ŝtalo je 13 procentoj.


Tiu ŝtala fabriko kun relative progresintaj ekipaĵoj estas konstruita en 1958. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, ili senĉese altigis la produktokvanton de ŝtalo kaj ŝtala materialo, dank' al senĉesa reformo de teknologio kaj ekipaĵoj, fundamente sen plimultigo de ekipaĵoj por afinacio kaj laminatado. La produktokvantoj de

ŝtalo kaj ŝtala materialo de 1971 plialtiĝis ol tiuj de 1965, la jaro antaŭ la kultura revolucio, respektive je 76.3% kaj 78.6%.

Iuj el la ekipaĵoj de afinacio kaj laminatado uzataj de la ŝtalproduktaj entreprenoj de Ŝanhajo estas produktaĵoj de la tridekaj jaroj. Al tiuj malnovaj ekipaĵoj, la laboristoj senĉese faris teknikan reformadon kaj altigis la kvanton kaj kvaliton de la produktaĵoj. Multaj fabrikoj de fero kaj ŝtalo rompis la rutinan regularon pri ĉesigo de produktado por riparo, efektivigis riparadon sen ĉesigo de fandado kaj malpliigo de la produktokvanto kaj kreis novan atingon de senĉesa kaj stabila altigo de produktado.

En la Dua Ŝtalfabriko de Ŝanhajo troviĝas malnova laminatilo. En la pasinteco, oni devis manipuli ĝin per mano; peniga estis la laboro, sed malalta estis ĝia efikeco. Laboristoj faris ĉirkaŭ cent teknikajn renovigojn al tiu maŝino kaj ĝiaj akcesoraj ekipaĵoj, turnis la unusulkan produkton en plur-sulkan, efektivigis plenan aŭtomatigon de laminatado kaj centoble altigis la produktokvanton de ŝtala materialo.

En la lastaj jaroj, al entreprenoj de fero kaj ŝtalo de Ŝanhajo aldoniĝis nemalmultaj novaj ekipaĵoj por afinacio kaj laminatado. Stariĝis unu post alia altfornoj, konvertoroj de LD-procedo kaj elektro-skoriaj rafinaj fornegoj, laborejoj por produkto de mezdikaj kaj maldikaj ŝtalplatoj kaj



La Unua Ŝtalfabriko de Ŝanhajo produktis senjuntajn ŝtaltubojn de nova speco.

senjuntaj ŝtaltuboj, kaj fabrikoj de feraj alojoj, siliciaj ŝtalplatoj k.a., tiel ke la produktopovo de fero kaj ŝtalo senĉese grandiĝis kaj la specoj rimarkinde plimultiĝis.

Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ “Ni ne devas iri la malnovan vojon de aliaj landoj de la mondo en disvolvo de tekniko kaj rampadi paŝon post paŝo post la aliaj”, la ŝanhajaj laboristoj kuraĝe faris teknikajn renovigojn kaj plimultiĝis novajn specojn de ŝtalo. En la pasinteco, la ordinaraj malaltalaj ŝtaloj de Ŝanhajo estis produktitaj laŭ eksterlanda literaturo, iliaj specoj pliiĝis malrapide kaj ĝis 1965 produktiĝis nur 5 specoj. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la vastaj

amasoj de laboristoj kreis originalajn novajn specojn de tiaj alojŝtaloj, laŭ la riĉfontoj de elementoj bezonataj por produkto de tiaj alojoj. Nun, tiaj alojŝtaloj jam multiĝis ĝis pli ol 80 specoj kaj la kvalito de iuj el ili jam atingis progresintan nivelon. Ekzemple, dank’ al uzo de altgrada senkroma alojŝtalo, oni altigis la laborefikon de metaltranĉado je 4 obloj.

Por disvolvi la ŝtalan industrion multe, rapide, bone kaj ekonomie, ŝanhajaj laboristoj de tiu branĉo persistis en la principoj de sinapogo sur la propraj fortoj kaj kombinado de indiĝenaj kaj modernaj metodoj. La Fabriko de Ŝtaltuboj de Malnormalaj Formoj de Ŝanhajo, fame konata tra la tuta lando kiel “malgranda fabriko faranta grandan aferon”, estas tipa ekzemplo pri tio.

En la pasinteco ĝi estis malgranda fabriko funkciigata de iu kvartala kolektivo. Ĝiaj konstruaĵoj estis simplaj kaj ĝiaj ekipaĵoj estis malnovaj. En la jaro 1958, laboristoj produktis la unuan senjuntan ŝtaltubon kun malgranda kalibro de nia lando per memfaritaj ekipaĵoj; kaj en 1962, ili sukcese produktis la unuan ŝtaltubon de malnormala formo de nia lando per ekipaĵoj de la tridekaj jaroj. En la pasintaj pli ol dek jaroj, tiu fabriko produktis pli ol 2200 specojn de senjuntaj ŝtalaj kaj alojŝtalaj kaj rara-

metalaj tuboj de malnormalaj formoj. 70 procentoj de la uzataj ekipaĵoj de tiu fabriko estas projektitaj kaj fabrikitaj de ĝiaj laboristoj. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, ili faris unu post alia 1500 tunan tubigan premmaŝinon, maŝinon por produkto de ondumaj tuboj kaj malvarme laminatan maŝinon kun tri ruliloj kaj kreis kondiĉojn por plua-paŝe multigi novajn produktaĵojn.

En la lastaj jaroj, sub la gvido de la Partio, la ŝtal-industria branĉo de Ŝanhajo vaste disvolvis socialisman kunlaboron kun aliaj branĉoj kaj inter produktaj, sciencaj kaj uzantaj unuoj de ŝtalo, efike utiligis ĉiujn utiligeblajn homfortojn, tek-


nikojn, ekipaĵojn kaj materialon kaj tiamaniere akcelis la disvolviĝon de la fera kaj ŝtala industrio. Ekzemple, la nova speco de ordinara silicia malaltaloja ŝtalo uzata por produktado de bicikloj estas kune produktita de la Unua Ŝtalfabriko de Ŝanhajo, la Dekaj Ŝtalfabriko de Ŝanhajo kaj bicikla fabriko en kunlaboro. En la pasinteco, por projekti novan specon de ŝtalo, laminati ŝtalan materialon kaj fari el tia materialo specimenon, oni bezonis almenaŭ 1-2 jarojn; sed nun, dank' al kunlaboro de la tri koncernaj unuoj, oni uzis nur du monatojn por plenumi la provproduktan taskon.

En la socialisma kunlaborado, la grandaj fabrikoj ludis la ĉefan rolon kaj samtempe oni aparte atentis pri tio, ke la malgrandaj fabrikoj ludu sian rolon. Antaŭ la jaro 1966, en la regiono de Ŝanhajo estis nur unu granda fabriko produktanta malvarme laminatitan siliciŝtalan bendon. Ĝia plej alta jara produktokvanto estis nur kelkdek tunoj kaj la kvalito de la produktaĵoj ne estis sta-

bila. En 1970, kvin malgrandaj fabrikoj de malvarme laminatita ŝtalbendo rapide konkeris la ŝlosilan teknikon en produkto de tia silici-ŝtala bendo kaj prove elproduktis tian produktaĵon dank' al kunlaborado. Kaj la produkta povo formita de tiuj kvin malgrandaj fabrikoj estis je pli ol ducent procentoj pli granda ol tiu atingita de la granda fabriko post okjara klopodado. La kvalito de ilia produktaĵo estas relative stabila. Akcelate de la malgrandaj fabrikoj, ankaŭ tiu granda fabriko altigis sian produktokvanton kaj kvaliton de malvarme laminatita siliciŝtala bendo.

Nun, Ŝanhajo ne nur povas produkti multajn specojn da ordinara ŝtalo kaj malaltaloja ŝtalo, sed ankaŭ multajn specojn da altkvalita ŝtalo kiel aloja ŝtalo kiu povas elteni altan temperaturon kaj aloja ŝtalo kun specialaj fizikaj karakterizaĵoj; krome ĝi ankoraŭ povas produkti ŝtalajn platojn, dratojn, tubojn kaj aliformajn materialojn de diversaj normoj kaj forte subtenis per ili la industrian kaj agrikulturan produkton kaj la naci-defendan konstruadon.

Sub helpo de frataj unuoj, la Dekaj Ŝtalfabriko de Ŝanhajo mem projektis kaj fabrikis aŭtomatan ekipaĵon kun kvin laminatiloj por produkto de ŝtalaj bendoj. Jen laboristoj produktas per ĝi.



Kombajno de Nova Tipo

SUR la vasta graso tero ondiĝas tritikaj spikoj. Du tute novaj kombajnoj rikoltas en iu kultivejo de Mudangiang.

La vizitantoj alvenis kaj ĉirkaŭis la kombajnojn. La stiristoj saltis de sur la maŝinoj kaj vigle diris al ili: “La kombajnoj estas projektitaj kaj fabrikitaj de nia lando mem. Ili povas labori ankaŭ en kavaj kampoj kaj rikolti kliniĝintajn plantaĵojn. Ili bone funkcias laŭ libera manipula-

do.” Iu maljuna profesoro, kiu multajn jarojn okupis sin pri esploro de agrikulturaj maŝinoj, longe rigardis la maŝinojn, surgrimpis unu el ili kun neretenebla deziro kaj mem prove stiris ĝin. Poste, li diris kapojesante kun profunda emocio: “Ĝi estas originala kombajno de nia lando.”

La fabriko de agrikulturaj maŝinoj «Orienta Vento» de Siping de Gilin-provinco, kiu produktas tiajn kombajnojn, estas fabriko ekskluzive sin oku-



Diskuto pri la projekto

Senĉesa renovigo de la kombajno en praktiko.



Altefika memira kombajno sukcese provfabrikita de la fabriko de agrikulturaj maŝinoj «Orienta Vento».



panta per produktado de agrikulturaj rikoltaj maŝinoj. Sed, antaŭ la granda kultura revolucio, pro malhelpo de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki, ĝi povis produkti nur imitaĵojn de alilandaj kombajnoj, tial ili ne povis bone konformiĝi al la postulo de nia kamparo.

La Granda Proletara Kultura Revolucio disvolvis la socialisman aktivecon de la revoluciaj laboristoj kaj teknikistoj. Ili decidis fabrikati novajn kombajnajn konformajn al la kondiĉoj de nia kamparo por fari sian kontribuon al disvolvo de agrikulturo de nia lando.

Sub la gvido de la revolucia komitato de la fabriko, laboristoj, revoluciaj kadroj kaj teknikistoj kune starigis projektan grupon. Tamen, mankis al ili kompleta teknika literaturo kaj multaj necesaj produktaj ekipaĵoj kaj materialoj. Iuj homoj, kiuj ne sufiĉe taksis la kreaĵon de la amasoj, diris: “Ĉu ni povos fabrikati kombajnajn de kompleksa tekniko kaj progresinta strukturo en la nunaj kondiĉoj? Prefere elektu iun fremdlandan specimenojn kaj ĝin reformu.”

Sed laboristoj diris kun plena memfido: “Kondiĉojn ni povas krei; se ni apogoj nin sur la saĝo kaj forto de la kolektivo, ni certe povos fabrikati kombajnajn de nova tipo!”

La revolucia komitato de la fabriko varme subtenis la iniciatemon de la amasoj kaj unu komitatano estis komisiita por gvidi la projektantaron por viziti vilaĝojn kaj kultivejojn kaj kolekti diversajn materialojn, kritikojn kaj proponojn de la amasoj. Ili venis al iu kultivejo de Hejlongjiang-provinco. Tie ili vidis vastan oran tritikan kamparon, tamen ankaŭ fortan maltrankvilon de la laboristoj kaj oficistoj pro ofta perturbiĝo de la imite fabrikita kombajno. Tie la projektantoj informiĝis pri la kritikoj kaj deziroj de agrikulturistoj. Reveninte al la fabriko, ili detale analizis la kolektitajn materialojn kaj faris seriozan diskuton pri siaj projektoj. En projektado ili ekiris de la realaj bezonoj en nia lando, samtempe donis atenton al apliko de fremdlandaj progresintaj teknikoj, kaj klopodis por ke projekto de ĉiu parto atingi avangardan nivelon.

La stirejo de imite produktitaj kombajnoj ne havis kovrilon kaj la stiristo devis labori sen ŝirmo. Ĉifoje ili projektis ĉambreton sur la fronta parto de kombajno. La vidkampo de la ŝoforo estas vasta kaj la manipulado pli komforta. Ankaŭ la asistanto havas larĝan sidlokon. Laŭ la trajtoj de la kampoj en la sudo kaj nordo de nia lando, ili projektis radajn kaj duonraŭpajn kombajnajn,

tial ke la maŝinoj povas pli facile trairi deklivojn kaj malsekan molan teron.

Dank' al disvolvo de kolektiva saĝo, la projekta grupo plenumis la projektadon en relative mallonga tempo.

Komenciĝis la prova fabrikado. La projekta grupo prenis sur sin la taskon de fabrikado kaj muntado. Iu elektra aparato antaŭe estis liverata de aliloka fabriko, sed nun la fabriko jam ĉesis tion produkti. Tiam kelkaj maljunaj laboristoj de la projekta grupo mem faris tion. La farita aparato estas tre taŭga, malmulte kosta kaj bonkvalita.

Ĉiu vera scio originas el praktiko; neniam malfacilo povas timigi homojn kuraĝajn en praktiko. Por altigi la laborefikon de la maŝino, ili devis grandigi la povon de la transporta sistemo. Tiam iuj proponis grandigi la ŝraŭbopuŝilon. Projekti ĝin estas afero relative facila, tamen tio aliigos la eksteran formon kaj pezigos la maŝinon kaj komplikigos la strukturon. Maljuna laboristo de la projekta grupo Li Hongjan pensis: “Projektante rikoltajn maŝinojn ni devas zorgi ke ili estu kiel eble plej oportunaj al la uzantoj, sed ne simple plenumi nian taskon.” Li kaj liaj kamaradoj faris detalan esploron kaj provojn. Fine ili trovis metodon por ŝanĝi la direkton de gren-elirejo kaj solvis la problemon per rapidigo de la turniĝo de la ŝraŭbopuŝilo, sen grandigo de ĝi.

La prova fabrikado de la kombajno ĉiam iris en la spirito de socialisma kunlaboro. Laboristoj de la fabriko, kiuj ne ricevis taskon en la prova fabrikado, venis en sia ripoza tempo por partopreni la laboron. Lju Hianĝang, estro de la 3-a laborejo, rimarkis ke la premformitaj lagrujoj atendis prilaboron. Post sia deĵorado li tuj venis al la laborejo kaj helpis prilabori ilin. Informiĝinte, ke en prova fabrikado oni bezonas triangulan rimformilon, iu maljuna laboristo de la 12-a laborejo tuj prenis sur sin la taskon. Li mem pretigis materialon kaj elfaris tion en unu nokto.

Dank' al la kuna klopodo de laboristoj kaj teknikistoj, la kombajno «Orienta Vento-6» estis fabrikita en tri monatoj kaj duono. Post provado en rikoltado de tritiko en kelkaj lokoj en la suda kaj norda partoj de nia lando, oni konstatis, ke tiu kombajno estas bonkvalita. Ĝi, bela en formo, estas malpli granda ol la imitaĵo je naŭono, malpli peza je unu tuno, sed pli efika je ĉirkaŭ unu oblo, pli simpla en manipulado kaj pli taŭga por rikolti tritikon, sojon kaj aliajn plantaĵojn.

Prospera Merkato en Urboj kaj Kamparo de Ĉinio



Sub la prilumo de la granda principo de Prezidanto Mao "Disvolvi la ekonomion kaj garantiĝi provizadojn", la merkato en urboj kaj kamparo de Ĉinio havas abundan fonton de varoj kaj stabilajn prezojn. Drapoj kaj kemifibraj teksaĵoj vendataj de Sanhajaĵ magazenoj estas tre bonvenaj al la amasoj.



La provizado de Tiangin fariĝas pli kaj pli kontentiga. La fonto de kokoj, anasoj, fiŝoj, viandoj, ovoj, k.a. estas tre abunda. Jen urbanoj elektas fiŝojn en butikoj.

Unu el la legomaj butikoj de Vuĝou de la Guangxi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono





Laboristoj kaj kadroj de la Fabriko de Infanaj Vestoj de Pekino projektas infanajn vestojn de novaj fasonoj.



Kun la disvolviĝo de agrikulturo, forstumo, brutobredado, flankokupo kaj fiŝado, abundas viandoj, ovoj, maraj fiŝoj, legomoj, fabaj kaj aliaj mangaĵoj. La foto montras viandan butikon de Ĝengĝou, Henan-provinco, kiu ne nur vendas viandon, sed ankaŭ liveras diversajn pretajn pladojn por kuirado.





En butik de lun
kukoj de Ŝanhaj



Al la merkato en kaj ekster la lando estas tre bonvenata enladigitaj mandarinaj produktita de la Ladmandariga Fabrika de Huangjan-gubernio de Ĝejiang-provinco per la maj Huangjan-mandarinaj.



Membroj de Ligoukiai-komunumo de la antaŭurbo de Pekino elektas bezonajon en magazeno.



Hjuanhua-gubernio de Hebej-provinco, fame konata produkteto de vinberoj, reton akiris riĉan rikolton. En la bildo: Komunumanoj plukas vinberojn por liveri al merkato.

Komunumanoj de la Longlin-a Aŭtonoma Gubernio de Diversaj Nacioj de la Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono vendas al komerca branĉo felojn kaj diversajn lokajn produktadojn.



Utiligo de Forĵetaĵoj en Industrio

LA vastaj amasoj de laboristoj, kadroj kaj sciencaj laborantoj de industriaj, higienaj, konstruaj kaj sciencaj fakoj de Tiangin aktive laboris por elimini la damaĝon de la forĵetitaj gasoj, likvoj kaj skorioj kaj antaŭenpuŝis la disvolviĝon de la industria kaj agrikultura produktado per reformo kaj utiligo de ili.

Tiangin estas grava havenurbo en norda Ĉinio kaj ankaŭ relative granda industria bazo. Antaŭ la Liberiĝo, pro konkurencado de imperiistoj, pli ol mil industriaj unuoj senorde dislokiĝis en la dense loĝataj kvartaloj kaj ĉiaj forĵetitaj likvoj de industriaj entreprenoj fluis en la solan akvofonton de Tiangin — Hajhe-riveron. La al Britio, Francio, Japanio kaj aliaj kvin imperiismaj landoj koncesiitaj kvartaloj ne konstruis unuecan sistemon de kloa-


koj nek faris racian aranĝon por forigo de senutilaj gasoj, tiel ke la aero estis venenigita, malpura akvo fluis surtere kaj diversaj skorioj estis ĉie ĵetitaj, kio serioze malutilis al la sano de la popolo. Post la Liberiĝo, sub gvido de la Komunista Partio de Ĉinio komenciĝis grandskala konstruado kaj reformado de la urbo Tiangin. Antaŭ ĉio, oni plenigis la kanalojn de malpura akvo kaj transformis ilin en asfaltajn stratojn, transformis malpurajn lagetojn en parkojn kaj forigis grandan kvanton da skorio. Poste, oni translokiĝis nombron da fabrikoj el la centra parto de la urbo, kiuj malutilis al la sano de la popoloj, al konvenaj lokoj; lokis la nove konstruitajn fabrikojn malsupre de fluo kaj en flanko al kiu blovas vento kaj tiamaniere oni multe reduktis la venenadon al la aero kaj akvofonto de la urbo.



Riĉa rikolto de fiŝoj bredataj en malpura akvo de Hihu-brigado en la antaŭurbo de Tiangin.

En 1958, sub la direktado de la ĝenerala linio persone ellaborita de Prezidanto Maŭ “**streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie**”, disvolviĝis en Tiangin popolamasa movado de batalo kontraŭ malpura akvo. La volontulaj laboraj trupoj de centmiloj da civitanoj, kadroj kaj lernantoj batalis sur la bordoj de Hajhe-rivero por radikale reformi la kloakan sistemon de Tiangin. En tre mallonga tempo, ili konstruis multajn pumpstaciojn kaj instalaĵojn por desinfekti kaj forkonduki la malpuran akvon laŭ kvin kloakaj sistemoj al la antaŭurboj. En la lastaj jaroj, tianginaj laboristoj, kamparanoj kaj sciencaj laborantoj faris grandan kvanton da eksperimentoj pri irigaciado kaj fiŝbredado per malpura akvo kaj akiris sukceson. Laŭ statistiko, la totala kvanto de azoto entenata en la malpura akvo drenita el Tiangin en ĉiu jaro egalas al tiu en 50,000 tunoj da amonia sulfato. Do malpura akvo estas neelĉerpebla fonto de sterko por la agrikultura produkto en la antaŭurboj. Nun, centmiloj da muoj da kampoj en la antaŭurboj estas irigacitaj per malpura akvo, kio akcelas la disvolviĝon de la agrikultura produkto. Ankaŭ la bredado de fiŝoj en malpura akvo akiris riĉan rikolton. En la pasinteco, oni povis akiri pli ol 200 kilogramojn da fiŝoj po muo en fiŝbredado per pura akvo, sed nun 600 kilogramojn en bredado per malpura akvo.

Norma petrolo produktita de la Prilaborejo de Eluzita Oleo de la Petrola Stacio de Tiangin.



Ekzameni la kvaliton de lubrikaĵo ekstraktita el uzita oleo.

La socialisma planita ekonomio de nia lando malfermis larĝan vojon por sinteza utiligo de materialoj. Nun nia lando jam prenas sintezan utiligon de materialoj kiel gravan ekonomian politikon. Tiel en starigo de novaj entreprenoj kiel en teknika reformo de malnovaj entreprenoj, oni devas fari aranĝon pri sinteza utiligo de materialoj kaj de la forĵetataj likvoj, skorioj kaj gasoj. Laŭ statistiko pri 70 unuoj de la tianginaj industriaj

branĉoj de kemio, teksado, metalurgio kaj konstrua materialo kaj komerca sistemo, en la periodo de 1970 ĝis la komenco de 1971, oni sukcesis en 190 relative grandaj temoj por sinteza utiligo de materialoj tra eksperimentado, kaj dank' al tio oni liveris al la ŝtato pli ol 35,000 tunojn da kemiaj materialoj kaj produktajtoj, pli ol 170 milionojn da tablojdoj, pli ol 500 tunojn da koloraj metaloj kaj pli ol 2,500 tunojn da ŝtalo. Kaj krome, el la forĵetaĵoj la tuta urbo reprenis 35,000 tunojn de acido, tiu kvanto egalas al la jara produktokvanto de mezgranda fabriko; ĝi ankaŭ produktis grandan kvanton da cemento, brikoj, tegoloj, fajencaj buloj kaj aliaj konstruaj materialoj, kaj ekstraktis polikristalan silicion, kadmion kaj aliajn gravajn materialojn. Ĉio ĉi tio montris, ke sinteza utiligo de materialoj kaj forĵetaĵoj ne nur povas radikale

Surglacia Sporto en Harbin



SUN HIAŬ KAJ HONG ĜONG

VINTRE, amasa surglacia sporto vigle disvolviĝas en Harbin de nordorienta Ĉinio.

En tiu subarkta urbo, la glaciiga periodo de la komenco de novembro ĝis la fino de marto de la sekvanta jaro estas oportuna tempo por disvolvi surglaciĝan sporton. Tiam funkcias en la tuta urbo centoj da grandaj kaj malgrandaj glitejoj kaj Songhua-rivero fariĝas granda natura glitejo. Ĉiutage, centoj da miloj da sportemuloj viglas sur la glitejoj. Ankaŭ la grandiozaj tutlandaj surglaciaj sportkunvenoj okazas tie. Tial Harbin estas delonge nomata Urbo de Surglacia Sporto.

En tiu bela sezono por surglacia sporto, ni vizitis multajn glitejojn kun granda intereso kaj rigardis variajn sportajn aktivadojn sur glacio, akompanate de kamarado Ĝang de la Sporta Komisiono de Harbin.

Dimanĉe sur strato, ni vidis multajn glitemulojn irantajn kelkope. Ili ĝoje iras al glitejoj, kun glitŝuoj surŝultre aŭ glacipilka frapilo enmane. Antaŭ la Stadiono de Ruĝa Gvardio en la centro de la urbo ni haltis allogate de svarma homamaso. Iuj el ili ŝanĝis vestojn, aliaj faris gimnastikon por komenci glitadon. Iu knabineto kun glitŝuoj sur

garantii la urban higienon sed ankaŭ produkti grandan kvanton da materiaj valoraĵoj.

En la batalo por radikale elimini forĵetitajn likvaĵojn, skoriojn kaj gasojn la iniciativo de diversaj unuoj kaj ilia socialisma kunlaborado estis vaste disvolvita. En la pasinteco, la forĵetitaj likvaĵoj, skorioj kaj gasoj de la Tiangina Sodo-fabrika kaj la Kemia Fabrika de Dagu ne estis utiligataj. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la loĝantoj, popolaj komunumoj, produktaj brigadoj kaj lernejoj starigis en kunlaboro 24 malgrandajn kemiajn fabrikojn kaj produktis 28 specojn da kemiaĵoj kaj medikamentoj. Laŭ la sama maniero, Tiangin

starigis grandajn modernajn fabrikojn por produkti silikatajn produktaĵojn, brikojn kaj tegolojn, kaj krome ankaŭ mobilizis loĝantojn starigi pli ol 40 malgrandajn produktaĵojn de cemento uzante ŝtalan skorion, alkalajn ŝtonojn kaj skorion de kalcia karbido kiel materialon kaj produktis grandan kvanton da cemento. Dank' al tiu aranĝo la malutilo de skorioj estis forigita.

Nun Tiangin estas daŭriganta esploradon kaj enketadon kaj serioze resumas sperton por levi sian laboron pri utiligo de forĵetitaj likvoj, skorioj kaj gasoj al nova nivelo.



Gepatroj kaj filino ĉiuj estas ŝatantoj de glitado.

la piedoj kaj ĉapo sur la kapo iris post amaso da homoj al la glitejo. Mi demandis ŝin: “Kiun aĝon vi havas, knabino?” Ŝi respondis per arĝenta voĉo: “Sesjaran.” “Ĉu vi venis sola?” Ŝi buŝe montris al la fluge glitantaj homoj kaj diris: “Jen, ankaŭ miaj gepatroj kaj frato venis. Mi devas rapide postkuri ilin!” Tion dirinte, ŝi sin klinis, piedpuŝis kaj forglitis laŭ la kurejo kiel ŝvebanta birdo. Oni diras, ke en feriaj tagoj nemalmultaj estas tiaj “familioj de surglacia sporto”.

Kvankam la temperaturo jam falis ĝis pli ol 30°C sub nulo, tamen sur la glitejo sportuloj en maldikaj vestoj kuras paro post paro, aro post aro kvazaŭ ŝvebantaj hirundoj.

Alia proksima glitejo estis svarme ĉirkaŭata de homoj, kiuj varme hurais de tempo al tempo. Oni diris al ni, ke tie iras amika maĉo inter amatoraj glacipilkaj teamoj de du fabrikoj.

Ni vizitis glitejon post glitejo ĝis tiu de Songhuarivero kaj ĉie vidis tian viglan scenon. La varia kaj lerta arto de glitado kaj la gajaj mienoj de la homoj donis al ni profundan impreson. Ilia sentimeco al frosto kaj persistemo en ekzercado estas vere admirindaj.

La glitejo Dongfanghong en dimanĉo




Kamarado Ĝang divenis nian penson kaj diris ŝerce: “Alveninte al la glitejoj, multaj homoj ne volas forlasi ilin kaj rigardas ilin unu post alia, eĉ ne sentante lacon. Ĉar ĉio ĉi tio respegulas face-ton de la feliĉa vivo kaj spirita fizionomio de la hodiaŭa popolo de Harbin.” Kaj li diris emociite, ke la surglacia sporto povas tiel prosperiĝi nur hodiaŭ sub la kora zorgo de la Partio, kiam la laboranta popolo jam liberiĝis kaj mastriĝis. En la malnova socio, kvankam tie estis tre bonaj naturaj kondiĉoj por disvolvo de surglacia sporto, tamen la vastaj laborantaj popolamasoj suferadis de subpremado kaj ekspluatado de la reakciaj regantoj havante nek vestojn por bone sin ŝirmi nek manĝaĵojn por pleniĝi la stomakon, kiu do havis la deziron pri surglacia sporto? Antaŭ la Liberiĝo, en Harbin estis nur 3-5 glitejoj tenataj de japanaj agresantoj kaj kuomintangaj reakciuloj, kaj tre malmultaj ludantoj sur ili. Tiam surglacia sporto estis nur ornamo en la vivo de malmultaj regantoj. Sed nun, kun la disvolviĝo de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado pliboniĝis la vivo de la popolo. Surglacia sporto estas rigardata kiel nemalhavebla amuzado kaj la vastaj amasoj de laborantaj popolanoj memkonscie ekzercas sian korpon kaj hardas sian

revolucion volon por konstrui kaj defendi la patru-landon. Multaj postlaboraj amasaj sportaj teamoj estis starigitaj sub la direktado de tiu klara penso.

En la Harbina Vagon-fabriko, ni intervjuis la veteranan laboriston Ĝou Vanking. Li estas membro de la glacipilka teamo de tiu fabriko kaj komencis surglacian sporton en 1956. Antaŭe lia korpo estis ne tre forta. Post kiam li sin ekzercadis per surglacia sporto laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ “**Disvolvu sportajn aktivadojn kaj plifortigu la fizikan kvaliton de la popolo**”, lia korpo plifortiĝis iom post iom. En la lastaj 16 jaroj, li neniam petis forpermeson pro malsano kaj ĉiam laboris energi-plene kaj superplenumis sian produktan planon ĉiumonate kaj ĉiujare. Li estis elektita kiel lertulo en produkto kaj teknika renovigo kaj estro de produkta grupo. Ankaŭ lia grupo estis elektita kiel avangarda kolektivo de la urbo.

Laboristoj de la Harbina Fabriko de Elektraĵ Mezuriloj rakontis pri ŝoforo de sia fabriko Vang Ŝumaŭ, kiu estas milica subplotonestro. Li ne nur gvidas siajn kamaradojn en bona plenumo de la taskoj de revolucio kaj produkto, sed ankaŭ aktive partoprenas en la surglacia sporto por hardi

Tuj komenciĝos maĉo.





sian korpon kaj revolucion volon en neĝblova vetero. Iufoje la gvidantaro komisiis al kamarado Vang taskon de helpado al frata unuo en nacidefenda konstruado. Tiam estis frosta vintro. Kvankam la vojo estis glita kaj kruta, tamen li ĉiutage veturigis la kamionon pli ol 500 kilometrojn en ir-reiro. Pro lia obstina kaj sentima spirito en laboro kaj elstara plenumo de la tasko, oni honore nomis lin “bona milicano de la transporta fronto”.

La faktoj viditaj de ni en la urbo konvinkis nin pri tio, ke surglacia sporto estas tre bona fizika aktivado. En la komenco ni pensis, ke multe da mono devas esti elspezita por konstrui tiel multajn glitejojn kaj aĉeti grandan kvanton da sportiloj, kvankam tiu sporto estas bona. Poste ni informiĝis, ke la glitejoj en fabrikoj, lernejoj kaj aliaj lokoj en la urbo estas plejparte konstruitaj de volontaj laboroj de popolamasoj kaj junuloj laŭ la principo de ŝparemo. Ĉiujare, kiam venas la tempo de glaciigo, oni povas

vidi homojn, kiuj pretigis glitejojn transportante akvon per kruĉoj kaj pelvojn kaj uzante pumpilojn. En la jaro 1970, laboristoj de la Harbina Fabriko de Elektraĵ Fadenoj konstruis ludejon de glacipilko per sia propra laboro. Se oni konstruus la ĉirkaŭmuron de la ludejo per nova materialo, oni devus elspezi 6000-7000 juanojn. La laboristoj opiniis, ke tio estas tro multekosta, kaj klopodis por eltrovi rimedon por konstrui ĝin per malmulte da mono aŭ tute senpage. Ili kolektis uzitajn tabulojn en liberaj horoj kaj mem konstruis lignan ĉirkaŭmuron kvalite kaj praktike taŭgan al la bezono. Anstataŭ aĉeti novajn protektilojn, vestojn kaj pilkofrapilojn, ili kiel eble uzis malnovajn post riparo aŭ uzis surgatojn. Tiu bona spirito de ŝparemo en disvolvado de sporto estis laŭdata de la vastaj amasoj.

Surbaze de vasta disvolviĝo de amasa surglacia sporto, aperis en Harbin nombro da eminentaj



Prospera Kulturejo de Bambuoj

EN Angi-gubernio ĉe la norda piedo de Tianmu-montaro de Ĝeĝiang-provinco de nia lando sin trovas Ŝuangji-brigado famkonata kiel kulturejo riĉa je moso-bambuoj (*Phyllostachys pubescens*). Ĉie sur ĝiaj montoj dense kreskas altaj bambuoj. En printempo, dikaj bambuidoj konkure elteriĝas post la pluvo kaj vidiĝas aparte belaj.

Bambuoj kulturataj de Ŝuangji-brigado nomiĝas je pli ol dek specoj kun malsamaj dikeco kaj elasteco, inter kiuj moso-bambuo estas tre valora kaj plej bona en kvalito. Tia bambuo kun dikeco de bovlo distingiĝas per siaj alteco kaj elasteco. Komunumanoj diris ke ĝi estas trezoro. Ĝiaj folioj povas esti utiligataj kiel sterkaĵo post fermentado

sportistoj. Iuj el ili fariĝis membroj de ŝtata sporta teamo, partoprenis internaciajn konkursojn en la nomo de la patrolando kaj la popolo kaj akiris relative bonan rezulton. Multaj el la fabrikoj, institucioj kaj lernejoj de la urbo starigis teamojn de glacipilko, kiuj ofte faras amikan konkurson, interŝanĝas sperton kaj plifortigas la solidarecon. Foje dum rigardado de konkurso de glacipilko, ni propraokule vidis jenan kortuŝan scenon: La glacipilkaj teamoj de la Unua Maŝinfabrika de Harbin kaj la Harbina Fabrika de Elektraj Fadenoj konkursis intense kaj neniu el ili povis venki unu la alian. Foje, kiam la avanulo de la fabrika de elektraj fadenoj sturmis kun la pilko ĝis antaŭ la golejo de la maŝinfabrika kaj pretis ĵeti la pilkon en la golejon, subite li falis teren. La golulo de la maŝinfabrika teamo pensis: La falinta teamano povis facile

vundiĝi ĉe la golejo kie iris intensa luktado. Li decideme forlasis la golejon, rapidis al la teamano kaj helpis lin stariĝi. La golejo de la teamo de la maŝinfabrika fariĝis sendefenda kaj la arierulo ne ĝustatempe ŝtopis la breĉon. La glacipilko estis sub la frapilo de la membro de la rivala teamo kaj povis esti facile batita en la golejon. La rigardantoj ĉiuj maltrankviliĝis pro la teamo de la maŝinfabrika. Sed la teamo de la fabrika de elektraj fadenoj ne ĵetpafis golon. Ili pensis, ke ili devas lerni de la eminenta kvalito de la laboristaro montrita en tio, ke la teamo de la maŝinfabrika preferis perdi unu poenton ol lasi homon vundiĝi. Ili decideme forportis la pilkon ekster la atakan zonon kaj reorganizis atakon nur post kiam la golulo revenis al sia posteno. La nobla komunisma moro de ambaŭ teamoj tuj vekis varman manklakadon ĉe la spektantaro.



Komunumanoj plektas diversajn bambuajn ilojn.

kaj brulaĵo, ĝiaj idoj estas bongusta legomo, kaj ĝiaj ŝeloj servas kiel materialo por produkti paperon kaj artefaritan fibron. Kaj ĝiaj trunkoj kaj branĉetoj estas vaste uzataj por fari agrikulturajn instrumentojn kiel korbo, vekto, korbeto por teokolektado k. a. Ankaŭ lito, seĝo, kuŝseĝo, mato, pluvĉapelo, legomkorbeto, ŝelo de termosoj k. a. bezonataj por la popola vivo estas faritaj el bambuoj. Tiuj produktaĵoj ne nur rezistas kontraŭ korodo, sed ankaŭ estas fortikaj kaj tre belaj. Krome, metiartistoj utiligas ĝin por fari diversajn metiartaĵojn, kiel penikujoj kun bela gravuritaĵo.

Laŭdire, Ŝuangji havas historion de pli ol mil jaroj en kulturado de moso-bambuoj, tamen ĝi neniam akiris tian grandan disvolviĝon kiel hodiaŭ. En la malnova socio, la plejparto de la tero kaj bambuaroj estis monopolita de malmultaj bienuloj kaj kulakoj, kiuj konkure hakis bambuojn pro sia profito, tiel ke bambuaroj sur la montoj de Ŝuangji iom post iom maldensiĝis. Krome, pro putra regado

de la reacia registaro kaj ekspluato de fikomercistoj, la malriĉaj bambukulturistoj vivis en frosto kaj malsato. Tiam, dorse portante 3-4 grandajn bambuojn ili iris trans montoj al urbetoj kelkdek kilometrojn foraj por vendo, sed per tio ili povis akiri nur 2-3 litrojn da maizo. Por vivteni la familianojn plejparto de la malriĉuloj devis labori ĉe bienuloj kaj kulakoj kiel brutoj, kaj ĉie ĉi tie regis mizereco.

Post la Liberiĝo la tero kaj bambuaroj revenis en la manon de la popolo. La popola registaro multe helpis montregionajn popolanojn en disvolvado de produkto per monrimedoj kaj produktaj materialoj, kaj ankaŭ tre zorgis ilin en la vivo, tiel ke la aktiveco de la amasoj plene elvolviĝis. En 1954 Ŝuangji-anoj sin organizis por iri la socialisman vojon kaj starigis la unuan forstan kooperativon en la gubernio. Post la fondiĝo de la popola

komunumo la kolektiva forto pligrandiĝis kaj produktado de moso-bambuoj disvolviĝis pli rapide. Nun inter pli ol 1,200 hektaroj da arbaroj de la tuta brigado sin trovas 660 hektaroj da bambuoj. La rezerva kvanto de moso-bambuoj pliiĝis duoble kompare kun tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo. La brigado ĉiujare liveras al la ŝtato ĉirkaŭ 250,000 moso-bambuojn kiel materialon de industrio kaj papera farado. En la lastaj jaroj, dank' al investo de la ŝtato kaj disvolvo de la kolektiva forto jam konstruiĝis ŝoseo longa je 14 kilometroj en la brigado, tiel ke aŭtoj povas atingi preskaŭ ĉiun el la produktogrupoj. Tial la komunumanoj ne plu ŝuldroportis bambuojn por vendo.

Dum longa praktikado en kulturado de bambuoj la komunumanoj de Ŝuangji akumulis multajn bonajn spertojn. En la lastaj jaroj ili resumis tiujn spertojn por direkti la produktadon laŭ scienca maniero. Ekzemple, dum la disvolvo de bambuoj


oni devas ofte forigi arbetojn en bambuaro por ke bambuoj bone kresku. Antaŭe ili forigis arbetojn unufoje en du jaroj, tamen multaj arbetoj kaj herboj kreskis jam sufiĉe alte en malpli ol unu jaro kaj konkure konsumis akvon kaj sterkon kun bambuoj. Rompinte malnovajn rutinojn, nun la komunumanoj ĉiujare forigis herbojn kaj arbetojn por garantii la bonan kreskon de bambuoj. Antaŭ kelkaj jaroj, laŭ la bezono de kresko de bambuoj la komunumanoj faris eksperimenton pri termalkompaktigo kaj sterkado al bambuaroj. En la komenco iu konservativulo diris: “Dum mia vivo de dekoj da jaroj, mi nur vidis, ke oni sterkas kampojn, sed ne monton.” Kiel oni devas konvinki tiajn homojn? Ili do elektis du samgrandajn terpecojn de bambuaroj por fari eksperimenton. Sur la unua terpeco ili kulturis bambuojn laŭ la malnova maniero kaj sur la alia ili faris termalkompaktigon kaj sterkadon en la konvena sezono kaj bone flegadis bambuojn. En la sekvinta jaro, kiam elteriĝis printempaj bambuidoj, tute malsamaj rezultoj prezentiĝis sur la du terpecoj: sur la unua bambuidoj estis malmultaj kaj malfortaj kaj sur la alia bone kreskis grandaj bambuoj, kaj bambuidoj estis multaj kaj dikaj. La fakto elokvente konvinkis tiujn homojn, kiuj ne aprobis reformadon. Nun ili ĝenerale malkompaktigis teron kaj sterkis bambuarojn, kio akcelis fekundigon kaj kreskon de bambuoj. Krome, laŭ la karaktero de moso-bambuoj pri kreska periodo de pli ol dek jaroj, ili hakis bambuojn 8-jarajn anstataŭ tiujn 4-jarajn, kio ne nur altigis kvaliton de bambuo sed ankaŭ plimultigis ĝian rezervan kvanton. Ĉiujare, kiam elteriĝas printempaj bambuidoj, ili organizis ĉasistan grupon por ĉasi aprojn kiuj nokte iras por manĝi bambuidojn. Kiam novaj bambuoj maturiĝis, ili ĝustatempe dehakis iliajn pintojn por ke bambuoj ne rompiĝu pro premado de neĝo.

Scienca kulturado kaj flegado akcelis disvolvigon de bambua produktado kaj senĉese plimultigis la enspezon de la kolektiva ekonomio. La enspezo de Ŝuangji-brigado rilate al bambuoj okupas 70% de ĝia totala enspezo. Per senĉese akumulita komuna kapitalo la brigado aĉetis agrikulturajn maŝinojn kaj produktajn materialojn por grandigi produktadon de agrikulturo, brutobredado kaj flankaj okupoj kaj fondis prilaborejojn de greno, furaĝo, teo, bambuo kaj fabrikon de insekticido. Sur la bazo de disvolvado de produkto pli kaj pli multiĝis la enspezo de la komunumanoj kaj ĉiam boniĝis ilia vivo. Nun en la tuta brigado ĉie regas prospero.



Komunumanoj malkompaktas teron kaj sterkas la bambuojn.

En eksperimenta moso-bambuaro de Ŝuangji





Vicĉefministro Li Hiannian, vicprezidanto de la konstanta komitato de la Tutlanda Popola Kongreso Guo Moĵuo, estro de la Kultura Grupo Vu De, vicestro de la Ĝenerala Stabo de ĈPLA Peng Ŝaŭhuj k.a. vizitas la Ekspozicion de Pentraĵoj de Vjetnamio.

INAŬGURIĜIS EN PEKINO LA EKSPOZICIO DE PENTRAĴOJ DE VJETNAMIO PRI LA KONTRAŬUSO- NA NACISAVA MILITO

En la 4-a de januaro de 1972, en la Ĉina Belarta Halo, komenciĝis la Ekspozicio de Pentraĵoj de Vjetnamio pri la Kontraŭusona Nacisava Milito, aranĝita de la Ĉina Popola Asocio de Amikeco kun Fremdaj Landoj kaj la Ĉina-Vjetnama Amikeca Asocio.

Eksponiĝis 229 pentraĵoj, inter kiuj estas «Prezidanto Ho Inspektas Iun Unuon de Kontraŭaerataka Artilerio», «Nepre Venku la Usonajn Agresantojn», «Stimulu Produktadon, Ĉiam Pretu al Batalo», «Inter Vjetnamio kaj Ĉinio ja Profundas la Amikeco: Samideaneco Plus Frateco» k.a. Tiuj eminentaj pentraĵoj havas originalan artan stilon de Vjetnamio. Ili vivece spegulas la ŝtalan volon de la heroa vjetnama popolo pri ĝisfunda venko super la usonaj agresantoj; spegulas la memfidon kaj firman decidon de la vjetnama popolo en efektivo de la granda celo liberigi la sudan Vjetnamion, defendi la nordan Vjetnamion kaj poste pace reunigi la patrolandon; priskribas la heroan vjetnaman popolon kiu apogas sin sur sia propra

forto, peneme luktas kontraŭ malfaciloj kaj sentime batalas kontraŭ perforto. La silka bildo pri Prezidanto Ho kaj Prezidanto Maŭ intime manpremantaj, profunde manifestas la fortikan revolucion amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj Vjetnamio. La ekspozicio profunde impresis la vizitantojn.

PRECIZA SPIRALA FROTUMMAŜINO

Post unujara klopodado, la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko sukcese fabrikis precizan spiralan frotummaŝinon de avangarda nivelo.

La maŝino estas multekapabla, sed ĝi estas simpla en strukturo, malgranda, tre preciza, facile manipulebla kaj riparebla. Ĝi povas prilabori spiralan stangon kun diametro de 500 mm. kaj longo de 5 metroj postulantane je unuagrada precizeco, kaj samtempe ĝi povas tranĉi cilindron kaj mekanike mezuri precizecon de interŝraŭbreloj.



Salo

POSTTAGMEZE, ĵus fininte la duan lernohoron, Gaŭ Ĝiming bonhumore iris al la kuirajo, kun kursolibro sub la brako kaj du kretaj stumpoj en la mano.

Enirinte en ĝin, li trovis ke kamarado Guj de la propaganda grupo de malriĉkamparanoj kaj mal-superaĵ mezkamparanoj en la lernejo okupiĝas pri kuirado.

“Ej! kamarado Guj, hodiaŭ ja estas mia vico por helpi la kuiradon. Kial vi venis!”

“La kuiristo Juĉjo fartas iom malbone, tial mi preparas la manĝon anstataŭ li por ke li iru ripozi.”

Lavante la manojn, Gaŭ Ĝiming diris ŝerce: “Kian kuirarton vi posedas?”

“Mi almenaŭ scias plene kuiradi la rizon kaj kunmanĝaĵojn, mi pensas,” respondis Guj kaj ĉerpis iom da akvaĵo de la kuirataĵ fiŝoj per kulero por ke Gaŭ Ĝiming gustumu ĝian salecon. Gaŭ faris tion ŝmacante, kaj diris: “Oni diras, ‘salu fiŝon forte kaj salu viandon malforte’. Laŭ mia opinio, aldonu iom pli da salo.”

Gujĉjo ŝutis kuleron da salo en la kaldronon kaj turnis la fiŝojn. Poste li sin klinis por rigardi la fajron kaj murmuris al si mem: “La fajro eble estas ne sufiĉe forta por forigi la malagrablan odoron de la fiŝoj kaj plaĉigi la guston.” Li sin turnis por preni fajrostangon por ĝin inciti. “Ne necesas tio!” diris Gaŭ Ĝiming kaj tuj ĵetis plenmanon da salo en la fornon, en kiu komenciĝis krakado: pi-pi-po-po!

“He, vi...” Gujĉjo kuntiris siajn brovojn. Vidante la verdajn flamojn leviĝantajn en la forno, Gaŭ Ĝiming diris kontente: “Jen vidu, la fajro rapide flamiĝas dank’ al la kemia efiko de salo.”

Gujĉjo diris bedaŭre: “Por tio ja sufiĉas fajrostango. Vi malŝparis la salon!”

Gaŭ Ĝiming diris tute senĝene: “Salo ja estas abunde ricevebla. Morgaŭ, en la kurso de bazaj scioj de industrio, mi donos lecionon pri klorata acido. Salo estas senfina naturdotaĵo.” Li nombris per fingroj: “Marsalo, putsalo, roksalo...”

“Ĉu salo estas dotaĵo de la naturo?” Gujĉjo flarperceptis en la diro ion ne agrablan. “S-ro in-

struisto, kiel vi donos tiun lecionon al la lernantoj?”

Gaŭ Ĝiming diris memfide: “Tion mi faros de ĝia praktika valoro ĝis ĝia kemia strukturo. Necesas ja klarigi ĝin kaj en teorio kaj en praktiko!”

“Ho!” Gujĉjo diris surprizite, “ĉu vi ankaŭ rakontos pri la deveno de salo?”

“Kompreneble! mi parolos tiel pri la formiĝo, kiel pri la molekula formulo kaj valenteco de salo.”

Gujĉjo skuis sian kapon senvorte. Li elprenis la fiŝojn el la kaldrono kaj metis ilin en telerojn. Post fermo de la forno, li eksidis apud Gaŭ Ĝiming, bruligis sian pipon kaj diris fumante: “S-ro instruisto, Prezidanto Maŭ instruas al ni: **‘Ĉiuj laboroj de lernejo servas por transformi la penson de lernantoj.’** Mi pensas, ke ankaŭ la donado de lecionoj pri natura scienco devas esti direktata per politiko. Prenu salon kiel ekzemplon, laŭ mia opinio ĝi ne devas esti rigardata kiel dotaĵo de la naturo.”

Ĵetinte rigardon al la horloĝo sur la muro, kiu montris, ke restas pli ol 20 minutoj ĝis la tempo por manĝo, Gujĉjo serioze diris: “Mi rakontu al vi ion pri salo.”

“Estis la dua duono de 1948. Nia Popola Liberiga Armeo venkis sinsekve en kelkaj grandaj bataloj kaj la tutlanda liberiĝo estis jam videbla. Tiutempe, ĉi-loko ankoraŭ estis regata de Kuomintang. La reakciuloj en siaj lastaj tagoj ankoraŭ kolektis sennombrajn impostojn kaj la prezoj leviĝis kelkfoje en ĉiu tago. En urboj 8 el 10 vendejoj ĉesigis sian negocon. Monbiletoj por dek litroj da rizo en mateno ne sufiĉis por aĉeti kvin litrojn jam en tagmezo. Per 5-6 ĝinoj (1 ĝino=0.5 kg.) da kotonono oni ne povis akiri 1 ĝinon da salo.”

“Ja tro kara! Nun oni povas ricevi 6-7 ĝinojn da salo kontraŭ 1 ĝino da kotonono.”

“Jes! La malnova socio kaj la nuna diferencas unu de la alia, kiel la ĉielo de la tero.” Gujĉjo daŭrigis, “Poste oni aŭdis, ke la ŝtonoj en kaverno de iu monto, distancanta de ni je pli ol 30 kilometroj, estas salgustaj.”



“Ĉu temas pri la salmino de Jinŝandian?” demandis Gaŭ Ĝiming.

“Jes, sed tiam ni tion ne sciis. Ne havante monon por aĉeti salon, ni do leviĝis frue antaŭ mateniĝo por fosi tie salgustajn ŝtonojn kaj ricevi el ĝiaj rompaĵoj salakvon, kiun ni uzis en kuirado de legomo. Sed post nelonge eĉ tian akragustan salakvon ni ne povis akiri.”

“Kial?”

“La loka tirano Ŝeng Gujĵong volis ekspluati la minon en komploto kun kapitalistoj en la urbo kaj fermis la kavernon. La distrikta administracio eĉ avertis per afiŝo, ke ĉiu, kiu volas fosi ŝtonojn en la kaverno, devas antaŭe pagi imposton. Ni malriĉaj fratoj faris firman batalon kontraŭ ili kaj pro tio nemalmultaj oferis sian vivon.

“En majo de 1949, la Liberiga Armeo kaptis la gubernian urbon kaj trovis en la saltenejo de la kuomintanga saladministracio montosimilajn salamasojn. De tiam ni komencis ricevi bonan kaj malkaran salon. Tio ne estus ebla sen la Liberiga Armeo gvidata de Prezidanto Maŭ!”

Nun, Gaŭ Ĝiming ekkomprenis la signifon de la rakonto de Gujĉjo kaj sentis ekbrulon de la vanĝoj.

Gujĉjo ekbruligis alian pipon da tabako kaj diris post profunda entiro de la fumo: “Tial, laŭ mia opinio, estas necese, ke vi rakontu teorie pri la kemia strukturo de salo, sed vi ne devas rigardi la salon sole kiel naturdotajon! Ni povas ricevi blankan salon, nur dank’ al tio ke la laboristoj, malriĉkampanoj, malsuperaj mezkampanoj kaj aliaj laboruloj renversis, sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la regadon de la ekspluatitaj klasoj.”

Gaŭ Ĝiming emocie diris: “Kamarado Guj, tre bone vi rakontis. Vi ne nur multe helpis min por doni bone la lecionon pri klorata acido, sed ankaŭ forte min inspiris en la reformado de nia instruado!”

* * *

Sonorilo anoncis komenciĝon de lernohoro. Gaŭ Ĝiming vigle surpaŝis la instruistan podion. Li malfermis la instruon projekton reviziitan en la lasta nokto kaj ĵetis trarigardon tra la tuta klasĉambro. En la lasta vico li trovis Gujĉjon kaj la sekretarion de la lerneja partia filio, kiuj lin salutis per kapklinoj kaj kuraĝigaj rigardoj, kvazaŭ dirante, ke ili kredas ke li certe povas doni bone la lecionon. Ĉe tio Gaŭ Ĝiming respondis per rigardo plena de amsento kaj sentis en si pli da energio.



ABUNDA RIKOLTO DE GINSENGO EN ĈANGBAJ-MONTARO

En 1971, la regiono de Ĉangbaj-montaro de Gilin-provinco akiris abundan rikolton de *ginseng*-o. La totala produktokvanto estis 1,005,000 kilogramoj, kio estas dudekoble de 1949.

La regiono havas 300-jaran historion de kulturado de *ginseng*-o. Ĝi estas tre valora fortiga medikamento laŭ ĉina farmacio. La gvidantaj organoj de diversaj niveloj de la regiono aktive alvokis la komunumojn kaj brigadojn kulturaj *ginseng*-on kaj helpas tiujn per mono kaj materialoj.

Solidareco, Batalo kaj Amikeco

Kvankam jam finiĝis la vizitado kaj prezentado de la geaktorj de la Pjongjanga Nacia Opera Trupo de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio, la arta trupo Doina de la rumana armeo kaj la japana baleda trupo Macujama, tamen ilia fajna arto kanta kaj danca kaj ilia profunda amikeco al la ĉina popolo ĉiam restas gravuritaj en la koro de la ĉina popolo.

Dum vizitado en Ĉinio la Pjongjanga Nacia Opera Trupo faris pli ol 50 prezentadojn de la granda revolucia opero «Maro de Sango». La opero sukcese modlis la heroan figuron de iu patrino kiel la reprezentanto de la korea popolo, kiu maltimas kruelan perforton kaj brave rezistas senĉese kontraŭ la agreso de la japanaj imperiistoj por batalakiri la liberecon de la nacio kaj sendependecon de la Patrio. La kantoj kaj dancoj prezentitaj de la arta trupo Doina emfaze prikantis la Komunistan Partion de Rumanio, la gloran revolucionan tradicion de la rumana popolo kaj la revolucionan batalspiriton de la armitaj trupoj kaj la popolo en firma defendo de sendependeco de la Patrio kaj rezistado kontraŭ imperiisma agreso. La japana baleda trupo Macujama prezentis en Ĉinio programerojn «Blankhara Knabino», «Japana Tamburo», «Kvin Okinavaj Knabinoj» kaj «Vjetnama Junulino», kiuj havas klaran klasan karakteron kaj fortan artan infektivon. Tiuj eminentaj kantoj kaj dancoj akiris laŭdon de spektatoroj de nia lando.

La prezentado kaj vizitado de la tri artotrupoj el Koreio, Rumanio kaj Japanio portis al la ĉina popolo ne nur iliajn elstarajn atingojn de revolucia arto, sed ankaŭ revolucionan amikecon de la tri popoloj, kaj kontribuis al pliigo de la batala amikeco kaj kulturaj interŝanĝoj inter la popoloj de Koreio, Rumanio, Japanio kaj la ĉina popolo.



Pjongjanga Nacia Opera Trupo de Koreio

«Maro de Sango» prezentata de la
Pjongjanga Nacia Opera Trupo

Supre maldekstre: La patrino paf-
mortigis malamikojn kaj malfermis
la urbopordon al partizanoj por
ataki la urbon.

Supre dekstre: Celebrado pro venko

Malsupre dekstre: Ĉinaj kaj koreaj
artistoj



Varma bonvenigo al la Pjongjanga
Nacia Opera Trupo





Arta Trupo Doina de Rumana Armeo



Ĉinaj kaj rumanaj artistoj kune kantas revoluciajn kantojn.



Opereto «Al la Voko» prezentata de la arta trupo Doina

Ĉina danco «Riĉa Rikolto» prezentata de la arta trupo Doina





Japania Baleda Trupo Macujama




Aktoj de la baleda trupo Macujama kaj la ĉinaj infanoj, kiuj partoprenis en ilia prezentado, promenas en parko.



«Blankhara Knabino» (*supre*) kaj «Vjetnama Junulino» (*malsupre*) prezentataj de la baleda trupo Macujama





Urbo de Ĉina-Pakistana Amikeco

LA antikva urbo Taxila en la nordokcidento de Islamabad, la ĉefurbo de Pakistano, okupas gravan lokon en la historio de ĉina-pakistana amikeco. Hjuan Ĝuang, la fama ĉina budhisto de Tang-dinastio, venis tien dum sia pilgrimo. Nun en la urbo sin trovas Taxila Pezmaŝina Fabriko finkonstruita de laboristoj kaj teknikaj laborantoj de Pakistano kaj Ĉinio post kvarjara diligenta laborado.

La nomita fabriko povas produkti ekipaĵojn por cementaj fabrikoj kaj sukerrafinejoj, kaldronegojn, levmaŝinojn, fervojajn materialojn kaj konstruajn maŝinojn. La finkonstruo de la fabriko estas nova atingo de Pakistano en disvolvo de sia nacia ekonomio kaj la konstruo de sia peza industrio per la propraj fortoj.

En la konstruado de tiu fabriko, la ĉinaj inĝenieraj kaj teknikaj laborantoj kaj pakistanaj laboristoj kaj teknikistoj laboris ŝultro ĉe ŝultro, venkis multajn malfacilojn kaj bone plenumis la taskon de produktado dum konstruado de la fabriko.

Por ke la fabriko kiel eble plej frue ludu sian rolon en la ekonomia konstruado de Pakistano, la administracio de la fabriko alprenis principon de samtempa entrepreno de fundamenta konstruado, instalado de ekipaĵoj kaj produktado. En la jarfino de 1970, la fabriko ricevis urĝan taskon por produkti nombron da ŝose-ruliloj. Tiam en la fabriko maŝinoj estis instalataj kaj tiuj por produkti antaŭajn kaj postajn radojn de ŝose-ruliloj ankoraŭ ne estis alportitaj. Por solvi tiun problemon, la ĉinaj inĝenieraj kaj teknikaj laborantoj cerbumis kaj faris eksperimentojn kune kun la pakistanaj kolegoj kaj laboristoj kaj fine sukcesis en farado de simplaj muldiloj kaj produktis radojn por 20 ŝose-ruliloj.

Aliafoje, la fabriko akceptis taskon produkti nitojn de transporta rimeno de 350-tuna dispeciga maŝino de cementa fabriko. Tiam en la fabriko ne estis specialaj laboristoj kaj maŝinoj por tiu labo-

ro. Por venki tiun malfacilon, la ĉinaj kaj pakistanaj laboristoj kaj teknikistoj kune esploris, mem faris simplan modlilon per ekzistantaj maŝinoj, poste prilaboris ĝin sur 100-tuna frapformiga maŝino kaj fine produktis nitojn, kiuj kontentigis la postulon de la cementa fabriko kaj garantiis ĝian regulan produktadon.

En la kuna laborado la pakistanaj kaj ĉinaj laboristoj kaj teknikistoj starigis inter si profundan amikecon. Ili ne nur bone kunlaboris, sed ankaŭ zorgis unu alian en la vivo. Dum laborado en Pakistano, la ĉinaj teknikaj laborantoj travivis multajn kortuŝajn momentojn.

En profunda nokto de la 28-a de februaro, 1970, falis pluvego, tamen en la fabriko brilis lampoj, tie la laboristoj streĉe sin okupis per prova funkciigo de maŝinoj. Pro ŝtopiĝo de drenilo sur la tegmento, la pluvakvo torentis en la laborejon kaj sin direktis al transformatoro. Se la transformatoro estos malsekigita, ne nur la elektra ekipaĵo difektiĝos, sed eĉ okazos brulo. En tiu alarma momento, du pakistanaj laboristoj kaj tri ĉinaj teknikistoj rapide surgrimpis la tegmenton altan je 14 metroj, forigis en la ŝtormo la obstrukcaĵon, ellasis la akvon kaj tiel garantiis la sekurecon de elektraj ekipaĵoj kaj laboristoj.

En oktobro de 1970, iu ĉina teknikisto enhospitaliĝis pro reno-ŝtono. Laboristoj kaj respondeculoj de la fabriko iris unu post alia al la hospitalo por lin vidi. Kelkaj pakistanaj laboristoj ĉie penis por trovi receptojn kaj kuracherbojn kontraŭ la malsano. Iu pakistana laboristo iris post laborhoru al veterana doktoro, kiu loĝis fore de la fabriko je pli ol 30 mejloj, petis de li kuracherbon kaj poste ĝin portis al la hospitalo. Kiam la ĉina teknikisto dankis lin, li diris: "Ni estas fratoj. Mi faris nur tion kio estas farenda por mi."

En Pakistano, la ĉinaj teknikaj laborantoj ĉie ricevis entuziasman akcepton kaj varman helpon de la pakistanaj popolanoj. Iufoje, kiam kelkaj

La Hindaj Ekspansiistoj Rikoltos

Sian Amaran Frukton

1

Per siaj krimaj agadoj de armita agreso kontraŭ Pakistano, la hindaj reakciuloj plene malkovris sian ekspansiisman ambicion.

La reganta kliko de Hindio, kiu heredis ekspansiismon de la imperiismo post la sendependiĝo de la lando, ĉiam praktikas politikon de grandaregna ŝovinismo kaj ekspansiismo rilate al najbaraj landoj.

En 1959, ĝi instigis ribelon en Tibeto de Ĉinio, minace forkondukis kelkdek milojn da tieaj loĝantoj al Hindio, kaj lasis publike fondon de la t.n. forfuĝinta registaro kun la ĉina naciperfidulo Dalajlamao kiel ĉefo. En 1962, hindaj ekspansiistoj faris armitan agresadon kontraŭ Ĉinio en la limregiono de nia lando kaj trafis hontindan fiaskon.

En 1947, kiam Hindio kaj Pakistano apartiĝis kiel du sendependaj landoj, Hindio senprokraste metis Sikimon kaj Bhutanon sub sian superregon

kaj kontraktis kun ili respektive "Interkonsenton pri Teno de Ekzistanta Situacio". En 7 junio 1949, Hindio deklaris transprenon de la administra potenco de Sikimo kaj subpremis la registaron, kiun siatempe fondis sikimanoj. En decembro 1950, estis kontraktita inter Hindio kaj Sikimo traktato, kiu faris la lastan protektorato de la antaŭa. Laŭ la traktato, la diplomatio kaj trafiko de Sikimo transiris en la manojn de Hindio. Nun en la teritorio de Sikimo, garnizonas grandanombre hindaj trupoj tiel ke Sikimo estas tute sub la okupado de hinda armeo. En Bhutano restas konstante la "Hinda Milita Trejna Taĉmento" el centoj da personoj, kiuj superregas la armeon de Bhutano.

En 21 novembro 1971, Hindio komencis grandaŝkalan armitan agreson kontraŭ la Orienta Pakistano, milite okupis ĝin kaj elbakis la t.n. Bangalan Ŝtaton. La hinda ministro de eksteraj aferoj S. Singh deklaris ke hindaj trupoj tie restos tiel longe kiel tiu ŝtato bezonos. Tio plene montras ke la pupa reĝimo ne povos ekzisti sen la protekto donita de la hinda bajoneto.

ĉinaj teknikistoj estis revenantaj de vojaĝo, la motoro de ilia aŭto paneis sur la vojo. Tion vidinte, multaj pakistanaj amikoj sin turnis al ili kun helpo. Iu aĉetis por ili benzinon ĉe la benzinstacio kaj iu venigis aŭtoripariston de proksima loko. Post riparado en pli ol du horoj, la aŭto denove ekfunkciis. La korpoj de tiuj helpemaj pakistanaj amikoj estis olemakulitaj kaj iliaj vestoj malsekigitaj de ŝvito. La profunda amikeco de la pakistanaj poloj al la ĉina popolo gravuriĝis en la koro de la ĉinaj inĝenieraj kaj teknikaj laborantoj.

La diligenta laboro donis abundajn fruktojn. La ŝvito de pakistanaj kaj ĉinaj konstruantoj elkreskigis ankoraŭ pli belajn florojn de amikeco inter Pakistano kaj Ĉinio. Nun 40 ŝose-ruliloj produk-

titaj de la fabriko jam estis transportitaj al konstruejoj de diversaj lokoj de Pakistano.

Multaj pakistanaj amikoj el diversaj lokoj venis por pririgardi la fabrikon. Vidante, ke sur la tero antaŭe herboplena jam konstruiĝis multaj altaj fabrikkodomoj kaj laboristoj lerte manipulas maŝinojn produktante la unuajn maŝinojn, ili sentis grandan ĝojon. La ĉefadministrato de la fabriko diris al la vizitantoj: La fabriko certe donos profundan influon al la disvolvo de la industrio kaj ekonomio de Pakistano sur la bazo de sendependeco. Kare-sante ŝose-rulilon iu maljuna laboristo diris al ĉina teknikisto: "Jen estas la unua ŝose-rulilo produktita de pakistanaj laboristoj kaj ĝi estas simbolo de pakistana-ĉina amikeco."

La superrego, interveno kaj tiranado de Hindio al najbaraj landoj vekas malkontenton de la lastaj. La hindaj reakciuloj certe ne havos bonan finon en antaŭenpuŝado de sia ekspansiisma politiko.

2

La reganta kliko de Hindio plie apogas sin sur imperiismo kaj freneze intensigas armadon kaj militpreparadon por efektivi siajn ekspansiajn ambiciojn, kio kaŭzis gigantan deficiton en financoj. Precipe, de kiam la hinda registaro senskrupule komencis sian agresan militon kontraŭ Pakistano, rapide kreskis ĝia financa defcito kaj plue leviĝis prezoj de varoj. La hinda ministro de financo Y.B. Chavan ne povis ne konfesi en la parlamento, la 13-an de decembro 1971, ke la financa defcito de Hindio en la periodo de la fino de marto ĝis la fino de novembro 1971 jam atingis 3,400 milionojn da rupioj (453 milionojn da usonaj dolaroj), per 1,170 milionoj da rupioj superis la jaran deficiton de la budĝeto (2,230 milionoj da rupioj).

Por kovri la grandan deficiton kaŭzitan de sia agresa milito, la reganta kliko de Hindio freneze pliigis impostojn ĉiurimede ekspluatante la popolon. Chavan prezentis al la parlamento aldonan budĝeton por pliigo de impostoj en la sumo de 1,350 milionoj da rupioj (180 milionoj da usonaj dolaroj) en la fiska jaro kaj 400 milionoj da rupioj (53 milionoj da usonaj dolaroj proksimume) en ĝia restanta tempo. Tiel la totalo de pliigitaj impostoj por la koncerna fiska jaro atingos 3,420 milionojn da rupioj (456 milionojn da usonaj dolaroj), inkluzive la sumon de 2,070 milionoj da rupioj de pliigitaj impostoj jam deciditan je la fino de majo 1971. La hinda gazetaro raportis pri tio kiel "anonco surpriza".

Krome, Chavan kunvokis la ĉefulojn de diversaj ŝtataj registaroj al kunsido, en kiu estis decidite kolekti 700 milionojn da rupioj per diversaj pezaj impostoj.

La vivo de la hinda popolo fariĝis pli kaj pli malfacila, rezulte de la agresa milito kontraŭ Pakistano. Malabundas varoj en diversaj grandaj urboj kaj rapide leviĝas la prezoj. Laŭ la informo de "Free Press Journal", la prezoj de la ĉefaj varoj en kaj ĉirkaŭ la urbo Bombajo kreskis je 10-20%. La po-kilograma prezo de rizo leviĝis de 2.00 al 2.25-2.50 rupioj, tiu de sukero de 2.20 al 2.50 rupioj kaj tiu de keroseno de 0.57 al 0.65 rupioj.

La elpremado farita de la hinda registaro al la popolo neeviteble incitis la hindan popolon al

forta malkontento kaj kontraŭstaro. En 26 novembro 1971 eksplodis ŝtatskala manifestacio en Assam kontraŭ la pliigo de impostoj kaj leviĝo de prezoj.

3

La rasa subpremo, feŭdisma ekspluato kaj mize-ro de popola vivo en Hindio estas malofte videblaj en la mondo.

El la pli ol 400 milionoj da vilaĝaj loĝantoj en Hindio la plejparto estas mizeraj terkulturistoj. La bienuloj kaj kulakoj, kiuj okupas 10% de la loĝantaro de la kamparo, posedas 85% de la totalo de agroj de la lando. Ekskluzive la mezkamparanojn, pli ol 300 milionoj da dungitaj kaj malriĉaj kamparanoj troviĝas en stato de almuzo. Ĉiujare milionoj da homoj mortis pro malsato. Dum la unua duono de la jaro 1969, en naŭ el la dek ses ŝtatoj de Hindio okazis malsato kaj en 95,000 vilaĝoj estis malsatantoj. Ĝis la fino de majo de la nomita jaro 23,000 homoj mortis pro malsato en la ŝtato Rajasthan, kie tiam 13 milionoj da homoj suferis seriozan malsaton.

La feŭdisma reganta klaso de Hindio de tre longe jam praktikas la heredan kastismon, laŭ kiu ĉiuj membroj de la socio estas herede dividitaj en malsamaj kastoj, inter kiuj estas malpermesitaj geedziĝo, personaj interrilatoj kaj eĉ kunmanĝo aŭ kunirado. Parioj estas sekvaĵo de tiu sistemo. Komence estis kvar kastoj: bramanoj, nobeloj, civituloj kaj sklavo. Kun la disvolviĝo de la hinda socio, ĉiam pli multiĝis kastoj kaj komplikiĝis la sistemo, tiel rezultiĝis la apero de grandanombraj t.n. parioj "netuŝeblaj".

La parioj estas plejparte senteraj kampuloj aŭ malriĉuloj, kiuj sin okupas pri "malpuraj" laboroj kiaj lavado kaj stratpurigado. Iliaj infanoj povas viziti nur lernejojn speciale destinitajn por parioj. La parioj fakte estas speco de sklavoj. Ili estas plej peze subpremataj, ekspluatataj kaj diskriminacie traktataj kiel la plej funda tavolo de la hinda socio. Sed subpremo elvokos ribelon, kaj ili certe ne volontos por ĉiam submetiĝi kiel sklavo.

La armita agreso kontraŭ Pakistano kaj subpremo al la hinda popolo fare de la hinda registaro certe vekos ankoraŭ pli fortan malkontenton kaj kontraŭstaron de la popoloj de Pakistano kaj la sudazia subkontinento inkluzive tiun de Hindio. La hindaj ekspansiistoj kaj iliaj subtenantoj certe rikoltos sian amaran frukton de tiu faro.

La Armeanoj kaj Popolanoj de Norda

Vjetnamio Kaptis 4 Usonajn Pilotojn

JE la 18-a de decembro 1971, la usona imperiismo senskrupule sendis plurajn grupojn da batalaviadiloj por invadi la aerospacon super la provincoj Hoa Binh kaj Thanh Hoa kaj krome ataki loĝareon en la provinco Nghe An. La armeanoj kaj popolanoj de la nomitaj lokoj brave batalis kontraŭ la usonaj piratoj kaj donis al ili meritan punon. Surloke estis faligitaj 4 usonaj aviadiloj F-4 kaj kaptitaj 4 usonaj pilotoj.

Posttagmeze de la 20-a de decembro, Ngo Dien, la estro de la Informa Departemento de la Ministerio de Eksteraj Aferoj de la Vjetnama Demokratia Respubliko, okazigis gazetaran kunvenon en Hanojo, en kiu li forte kondamnis la krimojn de bombado fare de la usonaj pirataj aeroplanoj kontraŭ norda Vjetnamio.

Ngo Dien diris, ke la 4 usonaj pilotoj nun venigitaj al la gazetara kunveno estas leŭtenanto Kenneth Roth Wells kaj majoro Leland Louis Hilderbrand (ambaŭ kaptitaj en la provinco Quang Ninh je la 18-a de decembro), leŭtenanto Samuel Richard Vaughan kaj majoro Kenneth Richard Johnson (ambaŭ kaptitaj en la provinco Hoa Binh samtage).

Ngo Dien diris: “Ĉifoje la usona imperiismo sendis multajn bataljetojn profundiĝi en la internan regionon de norda Vjetnamio. Tion atestis la fakto ke usonaj pilotoj estis kaptitaj en la distrikto Tan Lac de Hoa Binh kaj en la distrikto Hoanh Bo de Quang Ninh. En la lastaj monatoj la usona imperiismo ĉiutage sendis aviadilojn super la provincojn Nghe An, Ha Tinh, Quang Binh kaj la areon Vinh Linh por bombadi kaj prepari novajn militajn aventurojn kontraŭ la Vjetnama Demokratia Respubliko. Tio estas ekstreme serioza militagado de la usona imperiismo, kruda atenco kontraŭ la suvereneco kaj sekureco de la Vjetnama Demokratia

Respubliko, publika detruo de la garantio de la usona registaro ĉesigi bombadon kontraŭ norda Vjetnamio kaj tre impertinenta provoko kontraŭ la publika opinio de Usono kaj la mondo.”

Ngo Dien emfazis: “La usona imperiismo intencis uzi siajn aerfortojn en militaj aventuroj por sin savi el malvenko sur batalkampo kaj el sia senelira situacio. Sed ju pli la usona imperiismo fariĝas obstina kaj militema, des pli peza malvenko kaj, fine, ĝisfunda fiasko ĝin trafos.”

Supre: La usonaj pilotoj en la akcepta kunveno de jurnalistoj.

Malsupre: La kaptitaj usonaj pilotoj.



Unuiĝu por Gajni Ankoraŭ Pli Grandajn Venkojn

(En Esperanto)

Ĉefartikolo de la ĵurnalo «Renmin Ribao»,
la gazeto «Hongqi» kaj la ĵurnalo «Jiefangjun Bao»
por la Novjara Tago de 1972

12 pĝ. formato 18.5 x 13 cm.

Ĝi estas eldonita ankaŭ en la lingvoj araba, angla, franca, germana, hispana, japana, korea, rusa, haŭsa, ŝahilia kaj vjetnama.

Eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio
Distribuas la Libroservo de la Ĉina Esperanto-Ligo,
P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Aĉetu ĝin ĉe ĉiuj perantoj en diversaj landoj



LA NOVA PERUA MINISTRO DE EKSTERAJ AFEROJ REFOJE DEKLARAS SIAN POZICION DE DEFENDO DE LA 200-MARMEJLA MARTERITORIO

Je la 7-a de januaro, la perua ministro de eksteraj aferoj Generalo Miguel Angel de la Flor Valle refoje deklaris, en sia unua parolo al ĵurnalistoj post sia enoficiĝo, ke la perua registaro persistas en sia postulo de marteritorio de 200 marmejloj, kaj emfazis la gravecon de akcelo de la unuiĝo inter la membroj-ŝtatoj de la Andoj-traktato kaj la ŝtatoj de la tria mondo.

Ministro De la Flor montris, ke la defendo de marteritorio de 200 marmejloj estos neniam forlasita de Peruo.

Li montris ankaŭ: “La Andoj-traktato esprimis spiriton de unuiĝo kaj interhelpo. Tia spirito direktas la grandiozan projekton, kiu akcelas interligiĝon de la malgranda regiono kaj respegulas

la firman volon de la membroj-ŝtatoj, kaj dank’ al tio la disvolviĝo de ekonomio kaj socio estas akcelata kaj la kapablo de komuna traktado altiĝata.” Li diris, ke laŭ la opinio de Peruo tre grava estas la signifo de tio ke la Ĉina Popola Respubliko staras ĉe la flanko de la tria mondo.

LA DEKLARO DE LA ĈILIA MINISTERIO DE EKSTERAJ AFEROJ KONDAMNAS BOMBADON DE LA USONA IMPERIISMO KONTRAŬ LA VJETNAMA DEMOKRATIA RESPUBLIKO

Je la 4-a de januaro, la ĉilia ministerio de eksteraj aferoj publikigis deklaron, kiu forte kondamnis la bombadon de usonaj aviadiloj kontraŭ la Vjetnama Demokratia Respubliko.

La deklaro diris: Kiam Usono bombadas la Vjetnanan Demokratian Respublikon, “la ĉilia registaro devas esprimi sian zorgon, ĉar la bombado signifas longigon kaj intensigon de la hindoĉinia milito kaj serioze minacas la pacan perspektivon”.

La deklaro montris, ke “la ĉilia registaro, kiu ĉiam persistas pri la principo neinterveno kaj rigora respektado al la suvereneco de aliaj landoj, firme kondamnas tiujn agojn kontraŭajn al la nomitaj principoj.”

La Dek Tri Maŭzoleoj

— Unu el la vidindaĵoj de Pekino

LA Dek Tri Maŭzoleoj situas en la nordokcidenta antaŭurbo de Pekino 50 kilometrojn fore de la urbo. Ili estas tomboj de 13 feŭdaj imperiestroj de Ming-dinastio (1368 — 1644 p.K).

I


Se vi veturos norden tra la Pordego Deŝeng, nelonge post trapaso de la gubernia urbo de Ĉangping, unue vi vidos la ŝtonan arkaĵon, grandan ruĝan pordon, pavilonon kun tomba monumento kaj ŝtonajn figurojn de bestoj kaj homoj. Tiuj ŝtonaj figuroj de homoj kaj bestoj estas tre delikataj kaj similaj al la veraj. Tio konvinke montras la mirindan artan nivelon de la tiama laboranta popolo. Post la ŝtona arkaĵo kaj la granda ruĝa pordo estas la tereno de la Dek Tri Maŭzoleoj kun areo de 40 kvadrataj kilometroj. Tie prosperas

malhele verdaj pinoj kaj cipresoj, ĉirkaŭas montoj kaj frekventas vizitantoj.


La maŭzoleo Ĉangling estas tombo de la tria imperiestro Ĝu Di de Ming-dinastio. Ĝi estas la unue konstruita kaj la plej granda el la 13 maŭzoleoj. Ĝia halo Ling-en estas konstruita en 1427, kiu estis uzata de regantoj de Ming-dinastio kiel kulta ceremonio. La halo havas areon de 1956.44 kvadrataj metroj kaj estas unu el la plej grandaj antikvaj konstruaĵoj kun ligna skeleto nun ekzistantaj en nia lando. En la halo estas dekoj da kolonoj el nanmu-arbaj trunkoj, el kiuj la 4 plej grandaj en la centro de la halo havas altecon de 14.3 metroj kaj diametron de 1.17 metroj.

La unue malfermita subtera maŭzoleo el la 13 maŭzoleoj estas Dingling, kiu situas 2.5 km. sudokcidente de Ĉangling. Ĝi estas tombo de

La maŭzoleo Dingling



Parto de la subtera palaco



Ling-en-halo de la maŭzoleo Ĉangling



Ĝu Jigjun, unu el la feŭdaj imperiestroj de Ming-dinastio. Li regis super la ĉina popolo 48 jarojn (1573 — 1620 p.K.). En la aĝo de 22 jaroj, nome 12 jarojn post lia surtroniĝo, li jam komencis konstruigi por si la tombon.

La maŭzoleo konsistas el 5 haloj antaŭa, posta, centra, dekstra kaj maldekstra, kun totala areo de 1,195 kvadrataj metroj. La 5 haloj ĉiuj estas konstruitaj el ŝtonoj sen trabo kaj kolono. La tri pordoj de la antaŭa, centra kaj posta haloj estas priskulptitaj el blankaj marmoroj. Ĉiu pordo pezas ĉ. 4 tunojn. La posta halo altas je 9.5 metroj, en kiu kuŝas tri ĉerkoj sur ortangula ŝtona ĉerkolito je 1 futo alta. La ĉerko en la mezo estas de Ĝu Jigjun, kaj la apudaj du de liaj edzinoj.

En Dingling oni trovis objektojn el oro, arĝento kaj jado, porcelanaĵojn, lakitaĵojn, silkajn teksaĵojn, vestaĵojn kaj aliajn sume pli ol 2,000 diversajn objektojn. Tiuj objektoj estas ekspoziciataj en du ĉambroj de la muzeo de Dingling. La malfermo de Dingling ebligis al ni koni la sepultan sistemon, luksemon kaj malŝparemon de la feŭdaj regantoj kaj ilian kruelegan sklavigadon al la popolo. La delikataj artaĵoj montras al ni la altan saĝon kaj kreivon de la laboranta popolo.

II

La Dek Tri Maŭzoleoj estas kristalo de sango kaj ŝvito de la laboranta popolo. Por konstrui tiujn maŭzoleojn, la imperiestroj de Ming-dinastio uzis nekalkuleblajn monon kaj materialon.

La konstruado de Dingling de la imperiestro Ĝu Jigjun konsumis 298,400 kg. da arĝento, kiuj

sufiĉas por vivteni dek milionojn da mizeraj kamparanoj dum unu jaro. La konstruado daŭris 6 jarojn. En la tempo de urĝa konstruado, ĉiutage pli ol 30,000 homoj laboris intense. La materialo bezonata por la maŭzoleo estis alportita de diversaj lokoj de la lando: verdaj ŝtonoj kaj blankaj marmoroj de Fangŝan-gubernio proksime de Pekino, makulaj ŝtonoj de Huajjoŭ-gubernio kaj Zunhua-gubernio de Hebej-provinco kaj Gjunhian-gubernio de Henan, brikoj de Ŝandong-provinco kaj Suĝoŭ, la nanmuaj kaj cedraj trunkoj de Siĉuan, Gujĝoŭ k.a. provincoj milojn da kilometroj foraj. En la tempo de malprogresita trafiko la transportado estis vere peniga. En Fangŝan-gubernio, ĉiutage dekmil homoj hakadis ŝtonojn. Por transporti al la konstruejo unu ŝtonblokon kun longo de 10 metroj, larĝo de 3.3 metroj kaj diko de 1.7 metroj, dudekmil homoj devis trejnadi 28 tagojn. Ankaŭ la hakado kaj transportado de trunkoj estis ege penigaj. Por tio miloj kaj dekmiloj da laboruloj devis oferi sian sangon kaj eĉ sian vivon. En Siĉuan cirkulis popola kanto: “En la montojn eniris mil homoj sed eliris nur kvincent.” Tio estas sanga akuzo de la tiama laboranta popolo.

La feŭdaj regantoj ne nur kruelege sklavigis la laborantan popolon por konstrui maŭzoleojn, sed ankaŭ rabis en la tuta lando diversajn rarajn trezorojn por sia luksega ĝuado. Ĉiu el la du kronoj de la edzinoj de Ĝu Jigjun en la tombo estis inkrustita per pli ol 100 diverskoloraj juveloj kaj pli ol 5,000 perloj de diversaj grandecoj. Unu el la juveloj valoris ĉirkaŭ 20 kg. da arĝento, per kiu oni povis aĉeti 70 tunojn da rizo en tiu tempo. El tio ni vidas, ke sur ĉiu briko kaj tegolo, ĉiu ŝtonpeco

La Ĉinaj Fajraĵoj



Fremdlandaj amikoj ĝoje rigardas fajraĵon.



O KAZE de grandaj kaj solenaj festoj, krom fari tage celebrajn aktivadojn, la ĉina popolo ofte sin amuzas nokte ankaŭ per fajraĵoj. Multaj el fremdlandaj amikoj vizitantaj nian landon ĝuis buntajn kaj brilajn fajraĵojn sur Tian-anmen-placo de Pekino kune kun nia popolo. Kiam krepusko vualas la teron, ekbrilis la ornamaj lampoj sur tiu placo kaj ĝojaj homamasoj fluis tien de diversaj direktoj. Ili kantis kaj dancis por plene esprimi sian ĝojon kaj amon al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Super ili disŝprucis diverskoloraj fajraĵoj mirinde variantaj. Fajraĵo pafiĝis en la aeron kaj eljetis milojn da koloraj flagrantaj fajreroj. Jen iliaj koloroj ŝanĝiĝis, jen iliaj formoj aliĝis. Kelkfoje el la baldaŭ estingiĝantaj fajraĵoj subite eljetiĝis novaj briloj kaj floroj. Iuj fajraĵoj malrapide leviĝis supren post la ekbruligo, aliaj pendis en la aero kvazaŭ brilaj lampoj kaj ŝvebis en venteto dum longa tempo; triaj pepis kvazaŭ birdoj kantantaj en printempa mateno — ĉio ĉi tio akordiĝis kun la jubilo de la amasoj sur la placo.

kaj trunko estis ŝvito kaj sango de la laboranta popolo.


III

Pro la kruelega ekspluatado fare de la feŭda bienula klaso kun Ĝu Jigjun kiel la ĉefo, tra la tuta lando leviĝis unu post alia kamparanaj ribeloj.

En 1588, kiam la maŭzoleo de Ĝu Jigjun estis en konstruado, ĉe la limregiono de la nunaj provincoj Hubej kaj Anhuj eksplodis la kamparana ribelo gvidata de Liu Ĵuguo, kiu estis metiisto. Sub lia gvido, la ribelantaj kamparanoj alte levis la flagon “helpi malriĉulojn per havaĵo de riĉuloj”, sturmis en la domojn de bienuloj, disdonis ilian grenon al kamparanoj, liberigis arestitojn kaj punis riĉulojn. Liaj trupoj ricevis bonvenigon de la popolo kaj rapide disvolviĝis en armeon kun kelkdek miloj da homoj.

Nelonge post la morto de Ĝu Jigjun, en Ŝenhi-provinco eksplodis kamparana revolucia milito komandata de Li Ziĉeng. En la unua monato de 1644, la ribela armeo starigis kamparanan revolucionan reĝimon en Hi-an kaj poste marŝis al Pekino kun forto de ŝtormo. La 16-an de marto de tiu jaro, la kamparanaj trupoj okupis la Dek Tri Maŭzoleojn. Kun klasa indigno kaj malamo la kamparanaj trupoj forbruligis la halon Ling-en de Dingling. Post tri tagoj, la kamparanaj trupoj konkeris Pekinon kaj renversis la malluman regadon de Ming-dinastio. La lasta imperiestro Ĝu Joŭgian (Ĉongĝeng-periodo, 1628 — 1644 p.K) de Ming-dinastio falis en senelirejon kaj sin pendigis ĉe Mejŝan-monteto norde de la Imperiestra Palaco.

La kruelega ekspluatado kaj regado de la feŭda reganta klaso certe vekos oponon de la laboranta popolo kaj la popolo certe renversos la regantan klason. Tio estas nebarebla historia leĝo.



Post la eltrovo de pulvo en antikveco de nia lando jam komenciĝis farado de petardoj, el kiuj iom post iom disvolviĝis diversaj fajraĵoj. En la 12-a jarcento p.K. jam sin trovis skribo pri fajraĵo. Ankaŭ en verkoj de antikvaj poetoj ofte estis versoj pri fajraĵo kaj petardo. En la 13-a jarcento, la tekniko pri fajraĵ-farado disvastiĝis al arabaj landoj kaj poste al Eŭropo.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, precipe en la Granda Proletara Kultura Revolucio, tiu tradicia metiarto havis novan disvolviĝon. Laboristoj de fajraĵoj kreis multajn novajn specojn. Nun preskaŭ ĉiujare oni povas ĝui iliajn kreaĵojn kun novaj formoj kaj koloroj.

Liujang de Hunan-provinco kaj Dongguan de Guangdong-provinco estas famaj produktoj de ĉinaj fajraĵoj. Ili havas longan historion de farado de fajraĵoj kaj iliaj produktaĵoj estas plej ŝatataj. Krome, ankaŭ Gianghi-provinco kaj la Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono tion produktas.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, samtempe kun disvolvo de la produkto en la tradiciaj lokoj, stariĝis novaj fabrikoj, kiuj kreis nemalmultajn novajn specojn de fajraĵoj.

La specoj de niaj fajraĵoj estas multaj kaj iliaj ekbruligaj manieroj kaj efikoj estas diversaj. Ekzemple estas mantenaj fajraĵoj, kiujn oni ekbruligas en mano; surteraj fajraĵoj, kiujn oni eksplodigas sur la tero kaj kiuj povas eljeti brilajn buntajn fajre-rojn kaj prezenti interesajn formojn, kiel "Parado per Pavovosto", "Dancado al la Luno", "Magia Fajraĵo", "Flora Monto" k.a.; surkvaj fajraĵoj; aeraj fajraĵoj, inter kiuj la plej grandiozaj estas tiuj por solenaj festoj. Krome, okaze de amasaj festoj aŭ rondaj kaj familiaj festoj oni povas sin amuzi per ŝatataj fajraĵoj.

Fajraĵoj de nia lando estas ne nur ŝatataj de nia popolo, sed ankaŭ bonvenaj al popoloj de multaj aliaj landoj de la mondo. Rigardinte fajraĵojn de nia lando iu afrika amiko ĝoje diris: "Bone! Tre bone! Mi unuafoje vidis tiel bonajn fajraĵojn en mia vivo!" Ankaŭ araba amiko laŭdis: "La fajraĵoj de Ĉinio vere similas al bela brodaĵo." La ŝato de la samlandanoj kaj laŭdo de fremdlandaj amikoj multe kuraĝigis la ĉinajn fajraĵistojn. Ili decidis plue disvolvi sian kreivon kaj produkti ankoraŭ pli multajn kaj pli belajn fajraĵojn por aldoni novan brilon al la vivo de la ĉina popolo kaj la aliaj popoloj de la mondo.



Survoje de Marŝado

DUM marŝotrejno iu trupo de ĈPLA garnizonanta en la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono decidis preni Hiangjang-brigadon de Dongfeng-komunumo kiel etapon. Tie troviĝas maljunulino, familiano de ĈPLA-ano, kiun oni nomas avino Ŝa. Je mencio de tiu nomo la komandantoj kaj batalantoj de la trupo nature komparis ŝin kun la revolucia avino en la revolucia moderna pekino-opero «Sagiabang», kiu kore amas popolajn armeanojn. Kiel oni deziris ŝin tuj vidi.

La brigado decidis ke la maŝinpafla subplotono loĝu en la domo de avino Ŝa. Informiĝinte pri tio malgranda Vang de la subplotono tuj kun ĝojo iris al avino Ŝa en tia hasto ke li eĉ ne demandis kie ŝi loĝas. Irinte nelongan distancon li renkontis ruĝan

gvardianeton kaj demandis: "Kamaradeto, kie loĝas avino Ŝa?"

"Jen ŝi iras tie!" diris la gvardianeto farante montrogeston.

Kaplevinte, malgranda Vang vere trovis, ke iras antaŭ li maljunulino. Li do rapidis al ŝi kaj kriis: "Avino Ŝa! Avino Ŝa! Avino..."

Aŭdinte la krimon la maljunulino sin turnis. Malgranda Vang ne atendis, ke antaŭ li estas ujgura maljunulino; li ekdubis, ĉu ŝi estas avino Ŝa.

Vidante la malgrandan plenarmitan soldaton, la maljunulino varme demandis: "Kamaradeto, ĉu vi serĉas min?"



*Printempa pluvo en susuro
Envolvas la rokmuron per nebulo.
Milnombre flagras, ho, floraro
Arĝenta sur la akvo de kanalo.*

*Ondiĝas verde la kamparo
Kaj en ĝardenoj ruĝas floroj.
Vigliĝas homoj en la pluv-vualo;
Aŭdiĝas ĉie ridoj kaj paroloj.*

*Jen, vidu, en la bela plugsezono,
Amase venas gekomunumanoj
Kun refalditaj la manikoj, pantalono
Kaj laboregas per plej energiaj manoj!*

*Printempa vento — sprono al ĉevalo,
Printempa pluvo — duŝo por plugilo.
Kiel spegul' ekmontras sin la riz-kamparo.
Printemp' radias en reflektado per plenbrilo.*

*De pluvo kaj de ĝojo plenas la kamparo;
Ŝvitas la homoj; kote ŝmiras sin la kruroj.
Ridsonoj kunfandiĝas kun pluvomurmuroj
Kaj mikse fluas kune pluv-kaj ŝvit-gutaro...*

*La vento kaj la pluvo de printempo tiel plaĉaj
Kantadas ŝajne pri la homa laborofervoro.
La montvilaĝ' impete lernas de l' brigado Daĝaj.
En grandiozan bildon, ho, teksiĝas la ardanta koro!*

“Mi serĉas avinon Ŝa,” diris malgranda Vang.

Apenaŭ povante sin deteni de rido la maljunulino diris: “Ej, knabo, kial serĉi, avino Ŝa delonge atendas vin.”

Ŝiaj vortoj konfuzis malgrandan Vang kaj tiu ĉi pensis en si: “Ĉu la familia nomo de la ujugura maljunulino povas esti Ŝa? Kial do oni nomas ŝin avino Ŝa?” Ĝuste kiam li hezitis kaj ne sciis kion diri, alkuris al li la ruĝa gvardiano kaj diris al li: “Onklo, ŝi ja estas avino Ŝa.” La ujugura maljunulino nomiĝas Ŝajimuhan. Ĉar ŝi tre amas la popolajn soldatojn kiel avino Ŝa en «Ŝagiabang», ĉiuj respekte nomas ŝin avino Ŝa.

Aŭdinte tion, malgranda Vang haste faris paŝon antaŭen, ŝin salutis ĝoje vokante ŝin per la nomo avino Ŝa kaj la lasta respondis jese. Poste ili ambaŭ nereteneble eksplodis de ridego.

“Iru, malgranda kamarado,” ĝoje diris avino Ŝa, “por rigardi la domon preparitan por vi!”

Subtenante avinon Ŝa malgranda Vang iris kun ŝi al ŝia domo. Avino Ŝa varme akceptis lin kaj diris montrante la kontraŭan domon: “Jen la domo por vi, iru rigardi, kio ankoraŭ mankas por via bezono!”

Enpaŝinte en la domon bone purigitan, malgranda Vang iom maltrankviliĝis kaj diris: “Avinjo Ŝa, kiel bone vi zorgas pri ni armeanoj. . .”

Ridetante avino Ŝa diris: “Vi venis ĉi tien en longa marŝo. Tio estas farenda por ni.”

Ĉe tio envenis la estro de la revolucia komitato de la brigado kun la politika direktanto kaj aliaj kamaradoj de la subplotono. Malgranda Vang volis rakonti pri la ĵusa okazaĵo, tamen la politika direktanto diris la unua: “Kamaradoj, informiĝinte ke ni trapasos tiun ĉi lokon, avino Ŝa cedis kaj purigis domon por ni antaŭ kelkaj tagoj. Kiel ni danku la diversnaciecajn popolanojn pro ilia zorgo al ni?”

“Altigi singardemon kaj defendi la patrolandon!” ĉiuj respondis unuvoĉe.

“Prave,” diris la direktanto, “ni devas pli bone plenumi la instrukcion de Prezidanto Maŭ kaj danki avinon Ŝa per praktika agado.”

“Kamarado direktanto,” avino Ŝa rompita lian parolon, “se ne estus Prezidanto Maŭ, la Komunista Partio de Ĉinio kaj nia kara ĈPLA, ne estus la hodiaŭa feliĉa vivo de ni diversnaciecaj popolanoj.”

La vortoj de avino Ŝa plenaj de profunda proletara sento tiel kortuŝis la kamaradojn ke ili ne sciis kion diri. Premante la manon de avino Ŝa malgranda Vang emocie vokis “Avinjo Ŝa!” Ĝuste tiam aŭdiĝis deekstere sonora kanto pri amikeco inter armeanoj kaj popolanoj el «Ŝagiabang».



Pri Tiu Ĉi Numero

KIAM ĉi tiu numero venas en la mondon, estas marto, en kiu okazas la festo de la laborantaj virinoj de la mondo. Okaze de la festo, ni rekomendas al niaj legantoj en tiu ĉi numero la artikolojn «Antaŭe Sklavo, Hodiaŭ Mastro» de Ba Sang, sekretariino de la partia komitato de la Tibeta Aŭtonoma Regiono, «Dediĉi Mian Tutan Vivon al la Higiena Afero de la Patrio» de Lin Kiaŭĝi, direktorino de la ginekologia kaj obstetrika fakto de la Ĉefurba Hospitalo kaj du korespondaĵojn «Tri Komunistinoj» kaj «Inĝenierino Lin Janfang».

Per sia tragika travivaĵo, Ba Sang malkaŝis kaj akuzis la kruelegan persekuton de la damninda servuta reĝimo al la servutuloj kaj sklavo. Samtempe, ŝia artikolo diras al vi, ke la liberigitaj sklavo de Tibeto nun jam fariĝis mastroj de la nova Ĉinio. Dank' al la intima instruado de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, ili rapide altigis sian klasan konscion kaj firme tenas sian sorton. «Tri Komunistinoj» priskribas eminentajn reprezentantojn de kamparaj komunistinoj, kiuj senŝanceliĝe faras revolucion kune kun la amasoj kaj faris kontribuon sub la gvido de la Partio, en la periodoj de la nov-demokratia revolucio kaj la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

En la nova socialisma Ĉinio, sciencistinoj de la maljuna generacio aktive klopodas por la socialisma konstruado de la Patrio; junaj sciencistinoj sane kreskas. Lin Kiaŭĝi kaj Lin Janfang estas ekzemploj el ili.

La pasinta jaro estas la unua jaro de la Kvara Kvinjara Plano de Disvolvo de Nacia Ekonomio, en kiu la agrikulturo akiris riĉan rikolton de la deka jaro kaj la industrio venke plenumis la ŝtatan planon. La produktokvanto de ŝtalo atingis 21 milionojn da tunoj. Ni dankas, por tio, la laboristojn de fera kaj ŝtala industrio de la tuta lando kiuj pluapase plenumis la instrukcion de Prezidanto Maŭ «**Lernu de Daking en industrio**». «La Fera kaj Ŝtala Industrio de Ŝanhajo en Disvolvo» skribas pri tio. «Lokaj Industrioj Nove Aperintaj sur la Altebenejoj kaj Stepo» skize raportas pri la vigla disvolviĝo de la lokaj industrioj de Hingiang k.a. regionoj, kie antaŭe eĉ metiejo ne troviĝis.

Subtenate de siaj reĝisoroj, la hindaj ekspansiistoj faris kriman armitan agresan militon kontraŭ Pakistano, kio renkontis fortan kondamnon de la revoluciaj popoloj de la mondo. La usonaj agresantoj barbare bombadis Nordan Vjetnamion farante novajn krimojn kontraŭ la vjetnama popolo. La artikolo «Hindaj Ekspansiistoj Rikoltos Sian Amaran Frukton» en tiu ĉi numero malkaŝas kaj kondamnas la kriman agreson de Hindio al Pakistano. «La Armeanoj kaj Popolanoj de Norda Vjetnamio Kaptis 4 Usonajn Pilotojn» raportas la venkojn de la brave batalanta vjetnama popolo kaj la hontindan finon de usonaj agresantoj.

«Profunda Amikeco inter la Ĉina kaj Usona Popoloj» regis-

tris la varmajn scenojn de bonvenigo de la usona popolo al la ĉina delegacio kiu iris ĉeesti la 26-an Sesion de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj. Tiuj scenoj vivece spegulas la novan disvolviĝon de la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Usono.

Ni sincere petas, ke niaj legantoj nin helpu per kritikoj kaj proponoj pri nia laboro kaj la gazeto.

Korespondi Deziras

*F-ino Silvia Buliga, Disp. Uman, jud. Suĉeava, Stroești, Rumanio, 25-j. helpkuracisto, kun afrikanoj.

*S-ro Mindru Gheorghe, str. Haret 6, Liceul Pedagogic, Bacau, Rumanio, 15-j., kun gekolegoj el Afriko k Sudameriko.

*S-ro Fita Constantin, str. Maraști 56, Cimpulung-Muscel, Rumanio, 18-j. lernanto, kun t.m.

*F-ino Lavinia Tudor, jud. Mehedinti. Com. Braniște, Rumanio, 25-j. profesorino, kun gekolegoj el Ĉinio, Brazilo.

*F-ino Fortuna Daniele, Via Giovanni Merliani 144, 80128 Napoli, Italio, 23-j., kun junuloj el Rumanio, Albanio, Ĉinio, Jugoslavio.

*S-ro Gerardo Striano, Via Liberta 54, 80055 Portici, Italio, 18-j., kun aziaj landoj.

*F-ino Maria Vittoria Cavalcoli, Via S. Giacomo Capri 140, 80131 Napoli, Italio, 22-j. kun Ĉinio, Rumanio.

*S-ro J.J. Neumann, P.O.Box 9451, San Diego, Kalifornio, 92109, USA, kun t.m. pri ĉ. t. kaj interŝ. gramofondiskojn, librojn, pk kaj malgrandajn memorajojn. Povus eventuale gastigi eksterlandajn geespistojn antaŭ aŭ post UEA-kongreso 1972. Respondo garantiata.

Sur la Kovrilo:

Kazaĥaj geknaboj de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono

Sur la Dorskovrilo:

Geknaboj ludas en Bejhaj-parko.

Aŭskultu

Esp-an Disaŭdigon

de

Radio Pekino

Por Eŭropo

GMT Vendredo k. Sabato
20:00—20:30

Ondoj(m) 47 45 31 25

Por Japanio, Koreio

Pekina Tempo Sabato k. Dimanĉo
19:00—19:30

Ondoj(m) 47 40

Por Sudorienta Azio

Pekina Tempo Sabato k. Dimanĉo
20:30—21:00

Ondoj(m) 25 19

EL POPOLA ĈINIO

人民中国报道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 3 (164) 1972

Ĉefa Enhavo

Profunda Amikeco inter la Ĉina kaj Usona Popoloj	1
Tri Komunistinoj	3
Antaŭe Sklavo, Hodiaŭ Mastro	7
Dediĉi Mian Tutan Vivon al la Higiena Afero de la Patrio	10
Inĝenierino Lin Janfang	13
Lokaj Industrioj Nove Aperintaj sur la Altebenejoj kaj Stepoj	15
La Fera kaj Ŝtala Industrio de Ŝanhajo en Disvolvo	18
Kombajno de Nova Tipo	22
Utiligo de Forjetaĵoj en Industrio	25
Surglacia Sporto en Harbin	27
Prospera Kulturejo de Bambuoj	31
Salo	35
Urbo de Ĉina-Pakistana Amikeco	37
La Hindaj Ekspansiistoj Rikoltos Sian Amaran Frukton ...	38
La Armeanoj kaj Popolanoj de Norda Vjetnamio Kapit- tis 4 Usonajn Pilotojn	40
La Dek Tri Maŭzoleoj	42
La Ĉina Fajraĵoj	44

Eminentaj Kadrinoj



Li Hiukin (la dekstra), membro de la konstanta komitato de la partia komitato de la Kemifibra Fabriko de Baŭding, Hebej-provinco, studas kune kun laboristinoj por bonigi la kvaliton kaj grandigi la produktokvanton de rajono.

Ba Sang (la dua de dekstre), sekretario de la partia komitato de la Tibeta Aŭtonoma Regiono kaj estro de la revolucia komitato de Lang-gubernio, resumas sperton de riĉa rikolto kune kun baznivelaj kadroj.



Supre dekstre: Ĝaŭ Gjunĝen (la dekstra), sekretario de la partia filio de la produkta grupo de Dabajloŭ, Hong-hing-komunumo de la gubernio Dahing de Pekino, draŝas kune kun komunumanoj.

Sube dekstre: Vang Suĝen (la maldekstra), membro de la partia komitato de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio kaj kuracisto de la hospitalo de Najitu-komunumo, kuracas paŝtistojn en ilia hejmo.





Intelekta junulino Vang Jonggie venis de urbo al limregiono por fari revolucion kaj tie glorie aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. Nun ŝi funkcias kiel sekretario de la partia filio de roto.



Popolaj Papertranĉaĵoj de Ĉinio



